


Revuo
ESPERANTO
Internacia

N-ro 559 (6) JUNIO 1952



La deĉifrado de la skribaĵo estas longa kaj peniga laboro
(la deĉifranto estas S-ro Sekelj mem).
(*vidu paĝon 181*)

Specialaj artikoloj :	Paĝo
Idealo kaj Realeco : <i>H. Jakob</i>	161
Nefermita letero al J. V. Stalin : <i>U.E.A.-Estraro kaj S.A.T. Plenum-Komitato</i>	163
Mia Unua Mondo Jam Mortis : <i>James D. Sayers</i>	168
La brita muziko : <i>Frank Merrick</i>	171
La statistiko pri la Esperanto-Movado : <i>D-ro I. Lapenna</i>	175
La skribado de la Maja-Indianoj : <i>Tibor Sekelj</i>	181
Epikura promeno en Oslo : <i>Mason Stuttard</i>	185
Tradukaĵo : Naciaj antaŭjuĝoj : <i>Oliver Goldsmith (Avoto)</i>	187
Poezio : Barkarolo : <i>Eli Urbanová</i>	162
Kanto de Ariel : <i>W. Shakespeare (B. Clark)</i>	173
La 37-a Universala Kongreso de Esperanto	185, 189
Konstantaj Rubrikoj :	
Centro de Esploroj kaj Dokumentado	175
Enigma Konkurso N-ro 69	180
Esperantista Vivo	192
Internacia Konkurso 1952	179
Niaj kunlaborantoj : <i>Luigi Minnaja, Italujo</i>	174
Oficiala Informilo	191
Radio kaj Esperanto	190
Tra la Mondo Esperantista	166

Revuo

ESPERANTO

Internacia

N-ro 559 (6)

Junio 1952



Idealo kaj realeco

LA mondon regas dueco, puŝo kaj kontraŭpuŝo, tezo kaj antitezo, pozitivo kaj negativo ! Ĉia homa agado baziĝis sur tiu ĉi natura principo. Ankaŭ ni ne povas ignori ĝin kaj atenta ekzameno de okazaĵoj konfirmas tion. Esence idealisma klopodado, havigi al la homaro simplan rimedon sin interkompreni, tute ne tuŝante legitimajn sentojn pri naciaj lingvoj estas nia, sed ni ne povas malvidi la realecon, t.e. la mondon tia kia ĝi estas. Skeptika, mokema, ja eĉ malamika je nia ideo, tiel reagis la homoj je niaj pledoj, eĉ je niaj pruvoj kaj faktoj. Aliflanke ĉia penado propagandi publike progreseman ideon postulas rimedojn kaj uzante inverse konatan vorton oni povus diri : *la homo ne nur vivas de spirito, necesas ankaŭ pano*

Nia movado kaj niaj unuaj pioniroj, je la pinto D-ro Zamenhof mem, sin gvidis de sencoj homaranaj t.e. humanecaj pensoj. Tiu ĉi idealismo gvidis nin ĉiujn ; ĝi efektive kreis la movadon ; al ĝi ni dankas la atingitajn sukcesojn, rekonojn kaj ĉion tion, kion ni konstatas hodiaŭ. Ĝi, nome la idealismo, la porpaca, poregaleca, porhoma idealo direktis nin al akcepto de aliaj tre noblaj ideoj, kiujn oni povas kunigi en simpla resumo : forigi maljustecon interhoman kaj intergentan.

Ne estas mirige, ke la ideo por la paco konstanta, la paco ne bazita sur la timo de unu antaŭ alia pli forta, sed sur la solida fundamento de rajto, reciproka subteno, k.a. trovis inter ni multajn defendantojn. Ja oni povas eĉ diri, ke la porpaca klopodado trovis en la movado por internacia lingvo, sian plej ageman, plej popolan kunulon. Ĉar oni ne devas malkoni, ke la porpaca klopodado havis ĉiam karakteron de *predikanto en dezerto*. La bruta instinkto homa estas kaj restas ĉiam pli forta kaj necesas longa sperto kaj edukado ĝis venkos rezonado.

Sed kontraŭ la pure idealisma sinteno de granda plimulto de la Esperantistoj, ekzistas ankoraŭ alia fluo de opinio. Nome la nur praktika, profitiga PER-Esperanto t.e. la apliko de la lingvo **nur** por praktikaj, kelkfoje ja eĉ por vulgaraj celoj. Ni konstatu tion, ne kritikante ĝin kaj en multaj rilatoj, la serioza uzado nurpraktika de la lingvo helpas nin. Ree ni vidas la duecon, jen idealisme-homarana, jen komerc-praktik-utiliga. Unu ne ekskludas la alian : nia lingvo apartenas al ĉiuj kiuj uzas ĝin.

El tiu ĉi vidpunkto aperis artikolo en la Aprila numero pri la Eŭropa sekureco kaj internacia lingvo. Pluraj legantoj esprimis sian miron pri tio kaj deziris klarigon. Nu, mi modeste opinias, ke la Redaktoro rajtas havi

sian ideon pri la disvastigo de nia lingvo, same kiel la legantoj rajtas MALAPROBI ĝin. Sed estas la DEVO de gvidanta persono en la movado, atenti pri ĉio kio okazas en rilato al nia afero. Certe neniu ĝojus, se iamaniere oni provus krei rapidkursojn pri ia baza kombinaĵo de nacia lingvo, anstataŭ fari provon kun Esperanto.

La Estraro de U.E.A. en sia Paska kunveno diskutis la ideon esprimitan en la dirita artikolo kaj la koncernan elmontron pri teknikaj eblecoj de tia instruado de Esperanto. La Estraro de U.E.A. opiniis, ke tiurilate nia organizaĵo nenion entreprenu. Esperantistaj militistoj en kontakto kun koncernaj naciaj asocioj iniciatu en tiu ĉi afero. La starpunkto de la redaktoro skribinta la artikolon menciitan esprimiĝas proksimume jene: *se mi ne sukcesas konvinkigi la Diojn, mi movigos inferon* (laŭ Virgilio).

Hans Jakob.

Noto de la Redaktoro

La artikolo *Cifermistiko* aperinta en la Aprila numero de *Esperanto* altiris atenton de la legantoj. Samideano T. K. Slade atentigis pri plia strangaĵo de la cifero 9. Li diras: "Skribu ĉiujn ciferojn de unu ĝis naŭ, sed sen ok. 1, 2, 3, 4, 5, 6, 7, 9. Multobligu la serion per 9. La rezultato estas naŭfoje 1: 11111111." Samideano F. Boyet, Saint-Cloud, Francujo, tre detale traktis la problemojn montritajn en la dirita artikolo, je kio ni afable dankas. Ni okaze revenos je tiu ĉi interesa laboro.

La artikolo *La Angloj Popoldancas*, ankaŭ en la Aprila numero, enhavas erarojn: p. 107, linioj 17 kaj 42, *sudoriento* devus esti *sudokcidento*. La fotografisto de la *Moriska Trupo el Abingdon* (p. 106) estis A. J. Aldis, ne W. A. Newell. Ni pardonpetas.

Red.

Eli Urbanová :

Barkarolo

*Silentas la maro dormanta,
karese sonas barkarol' ;
sur ondoj kun paro amanta
balance naĝas la gondol'.*

*Ĉirkaue nur akvo helblua—
tre sorĉa, rava panoram' ;
aperis la stelo unua,
avizo grava de la am'.*

*Sulkiĝas jen ondo post ondo
kaj ĉiun sekvas dolĉa kis'
kaj ardas la ĵuroj ; la mondo
fabela ŝajnas paradiz'.*

*La nokto de l'amo jam pasas,
sin laste kisas juna par',
la steloj ĉielon forlasas,
la ĵuroj—dronas en la mar'.*

ESPERANTAJ TURISTAJ TAGOJ en GOTENBURGO, SVEDUJO

La Gotenburgaj esperantistoj alvokas partoprenantojn de la kongreso en Oslo kaj aliajn esperantistojn viziti la Esperantajn Turistajn Tagojn en Gotenburgo 31/7 kaj 1/8 1952. Ekskursoj en la ĉirkaŭaĵoj kaj en la urbo. Vizitoj en belaj lokoj, industrioj, muzeoj, amuzejoj. Loĝo kaj manĝo por malalta prezo. Nenia kongresa kotizo. Limdato por aliĝo 30.6.1952. Informojn petu de

Esperantaj Turistaj Tagoj, Skonertgatan 1, Göteborg Vr., Svedujo

*Nefermita letero**Al J. V. Stalin,**Moskvo*

EN la diskuto pri lingvistiko, meze de 1950, vi intervenis per unu artikolo kaj kelkaj leteroj, kiuj estis presitaj en "Pravda" kaj poste represitaj en "Bolŝevik".

La lastan el la leteroj, tiun de la 28-a de Julio 1950, vi dediĉis al la demando de internacia lingvo. En ĝi vi diris:

"Rilate la alian formulon de Stalin, prenitan el la parolado ĉe la XVI partia kongreso, en la parto, kiu koncernas la kunfandiĝon de la lingvoj en unu komunan lingvon, ĉi tie estis pensate al alia epoko, nome al epoko *post la venko de socialismo en mondaj kadroj* (substreki J.V.S.), kiam ne plu ekzistos mondimperialismo . . . , kiam la egaleco de la nacioj realiĝos, kiam la politiko de subpremo kaj asimilado de la lingvoj estos likvidita . . . kaj la naciaj lingvoj havos la eblecon libere riĉigadi unu la alian sur la vojo de kunlaborado . . . Ĉi tie temos ne pri du lingvoj, el kiuj unu suferas malvenkon kaj la alia eliras el la batalo kiel venkinto, sed pri centoj da naciaj lingvoj, el kiuj, rezulte de longa ekonomia, politika kaj kultura kunlaborado de la nacioj, unue elstaros la plej riĉigitaj unuecaj zonaj (regionaj) lingvoj, kaj poste la zonaj lingvoj kunfandiĝos en unu komunan lingvon, kiu, kompreneble, estos nek la germana, nek la rusa, nek la angla, sed nova lingvo, kiu estos kolektinta en si la plej bonajn elementojn de la naciaj kaj zonaj lingvoj."¹

Niaj asocioj ne deziras esprimi sian opinion pri la politika aspekto de viaj asertoj, precipe ne pri la "venko de socialismo en mondaj kadroj", pri la enhavo mem de la koncepto "socialismo" aŭ pri la formoj de internaciaj rilatoj en la du partoj de la hodiaŭa mondo. Nin ankaŭ ne koncernas via starpunkto pri diversaj lingvaj demandoj, kiujn vi tuŝis en la artikolo kaj en la leteroj. Sed koncerne vian starpunkton rilate al la Internacia Lingvo, ni konsideras kiel nian devon doni al vi kompetentan, koncizan respondon, des pli, ke en la lastaj monatoj ni havis la okazon konstati la negativan efikon de via letero por la plua disvastigo de Esperanto en kelkaj landoj:

(1) El via letero de la 28-a de Julio klare sekvas, ke vi ne nur neas la ekziston de la Internacia Lingvo, sed eĉ la nuran eblecon de ĝia ekzisto en la nuntempo.

Tiu via inkluzivita aserto estas kontraŭa al la realaĵo, ĉar la Internacia Lingvo Esperanto—kun centmiloj da personoj, kiuj ĝin uzis en la lastaj jardekoj kaj uzas hodiaŭ, kun sia riĉa originala kaj traduka literaturo, sia gazetaro, radioelsendoj, kongresoj, konferencoj, larĝa korespondado ktp.—ekzistas kaj funkcias praktike jam 65 jarojn, malgraŭ la fakto, ke ĝin malpermesis la cara registaro en Rusujo kaj Hitler en Germanujo, dum aliaj diktatorecaj, ŝovinismaj reĝimoj malfavoris kaj malfavoras ĝin.

(2) Teorie vi ligas la formiĝon kaj la ekeston de internacia lingvo kun la ekonomia, socia, politika, jura ordoj ("post la venko de socialismo . . ." k.t.p.), do kun tio, kion vi nomas "bazo" kaj "superstrukturo".

Tiu via aserto estas, interalie, kontraŭa al via opinio, esprimita en la artikolo de la 20-a de Junio 1950, kie vi plurfoje akcentis, ke la lingvo estas socia fenomeno,

¹ "Bolŝevik" N-ro 14/1950, p. 5-6.

“naskita ne de tiu, aŭ alia bazo, de la nova aŭ malnova bazo . . . , sed de la tuta irado de la historio.”²

Kaj vi precizigis tion en la letero al J. Kraŝeninnikova :

“Mallonge, la lingvon oni rajtas alnombri nek al kategorio de bazoj, nek al kategorio de superstrukturoj.”³

Kial, do, laŭ via opinio, la Internacia Lingvo devus atendi *ad infinitum* ian “novan bazon” kaj ian “novan superstruktureon” por formiĝi kaj ekesti ?

(3) En la menciita respondo al J. Kraŝeninnikova, kiu demandis pri la influo de la klasoj sur la lingvon, vi diris, ke la klasoj havas ian influon, ke ili alportas en la lingvon siajn specifajn vortojn kaj esprimojn. Kaj vi daŭrigis :

“Da tiaj specifaj vortoj kaj esprimoj, kiel ankaŭ da kazoj de diferencoj en la semantiko, estas tiom malmulte en la lingvo, ke ili eble-eble prezentas unu procenton de la tuta lingva materialo. Sekve, la tuta cetera grandega plimulto de vortoj kaj esprimoj, kiel ankaŭ ilia semantiko, estas *komuna* (substrekis J.V.S.) al ĉiuj klasoj de la socio.”⁴

La realaĵo estas precize inversa. La plej evoluintaj lingvoj posedas hodiaŭ ĉirkaŭ 400,000 vortojn.⁵ Shakespeare—la verkisto la plej riĉa je vortoj—skribis ĉiujn siajn verkojn per iom pli ol 14,000 vortoj. Laŭ la lingvisto M. Müller ankoraŭ en la XIX-a jarcento troviĝis vilaĝoj en Anglujo, en kiuj la kamparanoj ne sciis pli ol 400 vortojn ! Meze kleraj homoj posedas kutime 4000–5000 vortojn. Tio signifas, ke la meza individua vortoprovizo estas proksimume 1 procento de la tuta vortaro de iu lingvo. Tio plue pruvas, ke la vorta materialo, kiu estas *fakte komuna* al ĉiuj membroj de iu lingva komunaro, inkluzivante do ankaŭ la plej malklerajn tavolojn, estas eĉ multe pli malalta ol 1 procento de la tuta vortoprovizo de la koncerna lingvo. Ĉio alia apartenas al la apartaj ne nur klasoj, sed ankaŭ profesioj, fakoj kaj eĉ flankaj okupoj, kiaj estas la sporto, ludoj k.s.

Kun la evoluo kaj ĉiam pli granda specialiĝo de la scienco kaj de la tekniko en la lastaj jardekoj, ĝuste tiu “specifa” parto de la nacilingvaj vortaroj treege riĉiĝis. Sed pro la ĉiam pli vigla internacia rilatado, tiu riĉiĝo normale okazadis kaj okazas ĉefe ne plu sur plano nacia, sed multe pli sur plano internacia. Oni povas facile observi tiun procezon de ĝenerala proksimiĝo aŭ —alivorte dirite—internaciigo ne nur de la vorta materialo de diversaj lingvoj, sed ankaŭ de la formoj de esprimado. Escepton faris la hitlera reĝimo kaj la reĝimoj, kiuj ĝin imitis : ili provis artefarite, per politikaj kaj juraj rimedoj, haltigi tiun normalan evoluon.

Tiamaniere okazas, ke eĉ vi mem, en la malgranda parteto, kiun ni ĵus citis, uzis 7 fojojn internaciajn radikojn en nuraj 4 linioj (ruse : specifiĉeskiĵ, semantika (du fojojn), procent, material, masa, klas). En via tuta artikolo vi uzis de 10 procentoj ĝis 30 procentoj da internaciaj radikoj depende de la demando, kiun vi priparolis. Se oni malatentus la ofte ripetatajn konjunkciojn, prepoziciojn kaj la plej kutimajn verbojn, kiuj kompreneble ne povas havi internacian karakteron, tiu procento ankoraŭ tre altiĝus.

² “Bolŝevik” N-ro 12/1950, p. 2.

³ “Bolŝevik” N-ro 12/1950, p. 15.

⁴ “Bolŝevik” N-ro 12/1950, p. 17.

⁵ La granda “Oxford Dictionary” de la angla lingvo enhavas 414,825 vortojn.

Ĉiu ĉi signifas, ke :

(a) La lingvoj jam plurajn jarcentojn internaciigas ĉiam pli kaj pli surbaze de la ĝenerala materia kaj spirita evoluo de la homaro. La diversaj politikaj reĝimoj povas por kelka tempo artefarite bremsi tiun evoluon, sed ne povas ĝin haltigi.

(b) Kelkaj branĉoj de la vivo—precipe la scienco kaj tekniko—jam tiom internaciigis ankaŭ lingve, ke specialisto de kiu ajn branĉo povas kun malpli da malfacilaĵoj kompreni verkon el sia fako skribitan en fremda lingvo, ol tiun saman verkon povas kompreni nespecialisto samlingvano. Oni provu legigi ekzemple la parton pri semantiko el via letero al kiu ajn kolhozano kaj oni facile baldaŭ konvinkiĝos pri la vereco de tiu fakto.

(c) Tiu internacia lingvomaterialo prezentas sufiĉe larĝan kaj sufiĉe solidan bazon por konstrui sur ĝi vere internacian lingvon donante al ĝi simplan gramatikan formon. Esence ĝuste tion faris la genia aŭtoro de Esperanto, doktoro L. L. Zamenhof, kies verko malgraŭ la ĉiaspecaj malfacilaĵoj kaj kontraŭstaroj, disvastiĝis tra la tuta mondo.

(4) Kiam vi parolas pri “venko de socialismo”, evidente sub “socialismo” vi komprenas la reĝimon, kiu nun ekzistas en Sovetunio kaj kiu—eble kun nuancaj diferencoj—realiĝas en vico da aliaj landoj.

Konsiderante, do, ke sur tiuj larĝaj spacoj—laŭ via aserto—jam devus esti realigita la “egaleco de la nacioj.” kaj “likvidita la politiko de subpremo kaj asimilado de la lingvoj”, kio estas unu el la manifestiĝoj de la “mond-imperialismo”, oni devus atendi—denove laŭ via opinio—almenaŭ la komenciĝon de kunfandiĝo de la lingvoj en unu novan “zonan” lingvon, komunan al la nacioj vivantaj sub tiu reĝimo.

Anstataŭ tio, ĉiu povas konstati, ke la rusa lingvo estas devige instruata al milionaj amasoj da nerusaj popoloj. Samtempe la sovetaj lingvistoj proklamas tiun lingvon “instrumento de la plej progresiva civilizacio de la plej progresiva scienco lingvo de paco kaj progreso granda, riĉa kaj potenca” (Prof. Lomtijev en “Izvestija” de la 24-a de Majo 1950). Eĉ la nuran eblecon de internacia lingvo en la nuntempo oni atakas kiel esprimon de “kosmopolitismo, ideologio reakcia de la imperialista burĝaro” (Voprosi filozofiji, N-ro 2/1949). Oni ne hezitas aparte deklari, ke la rusa lingvo “ne estas nur la lingvo de U.S.S.R., sed ankaŭ la Internacia Lingvo en la popolaj demokratioj” (Prof. Jakovljev en “Vjestnik Akademiji Nauk SSSR”, N-ro 2/1950).

Tiuj faktoj—ŝajnas al ni—parolas sufiĉe klare per si mem. Multe pli konvinke ol viaj teoriaj eksplikoj, ili klarigas la verajn kaŭzojn de via negativa starpunkto rilate al la Internacia Lingvo.

Ni tre dubas, ke la faktoj, kiujn ni objektive prezentis en tiu ĉi letero, igos vin ŝanĝi vian starpunkton. Ne por tiu celo ni skribis al vi. Ni nur deziris klare fiksi nian starpunkton. La plua evoluo de la historio montros kiu pravas.

Londono-Parizo, Majo 1952

**Estraro
de**

Universala Esperanto-Asocio

**Plenumkomitato
de**

Sennacieca Asocio Tutmonda



Tra la Mondo Esperantista



Argentino

6-a Landa Jarkunveno okazis 10–13 aprilon en La Plata. La publika malfermo okazis en salono de grava Instruista Asocio, kun granda ĉeestantaro. Prof. J. Hansen bele faris la ĉefan paroladon. Pastro J. B. Kao, ĵus alveninta de Hong-Kong, donis saluton de la ĉinaj Esperantistoj; salutis ankaŭ la Bolivia Esperanto-Asocio, pere de la sekretario, G. Kushner Smith; U.E.A. salutis letere. La festan parton plenumis ĥoro de universitatanoj, kiu kantis, i.a. nian himnon ĉe la komenco.

La ceteraj kunvenoj okazis en la sidejo de popola universitato—kunsidoj laboraj, kulturaj kaj propaganda, kaj kurso rezultiĝis pro tiu lasta. Okazis ankaŭ komuna tagmanĝo kaj vizitoj al la mondfama naturscienca muzeo kaj urba parko.

Neatendita 'postkongreseto' okazis en San Sebastian (antaŭurbo de Buenos Aires) kie ekzistas esperanta kampo, posedaĵo de la Asocio de tiu urbo.

Danlando

Ŝtatsubvenciita arkeologia tendaro. Same kiel en du antaŭaj jaroj okazos denove internacia arkeologia tendaro por esperantistaj studentoj kaj altlernejanoj somere 1952.

La aranĝo komenciĝos en Kopenhago la 5-an de julio, kaj dum du tagoj la partoprenantoj vizitos vidindaĵojn de Kopenhago, poste oni iros al Nordjutlando kie la partoprenantoj partoprenos la elfosadon de

vikinga fortikaĵo Aggersborg. Jam antaŭ du jaroj esperantistaj studentoj elfosis tie. Dum la elfosado la partoprenantoj loĝos en hotelo kaj manĝos en privata pensiono. La 23-an de julio oni vojaĝos al internacia studenta centro en la bienego Hald apud urbo Viborg. Kaj tie la partoprenantoj restos ĝis la 26-a de julio.

Pro ŝtata subvencio la partoprenantoj pagu nur 110 danajn kronojn por la trisemajna restado, kaj en tiu prezo estas enkalkulita: restadoj (manĝo, loĝo kaj ekskursoj) en Kopenhago, Aggersborg kaj Hald. Krome ankaŭ vojaĝo de Kopenhago al Aggersborg, kaj de Aggersborg al Viborg. Dum la elfosado la partoprenantoj ricevos 1 danan kronon pro 1 labortago.

Pasintan jaron multaj vane aliĝis, tial la aranĝanta organizaĵo petas ke ĉiuj interesatoj tuj aliĝu.

Petu senpagan programon de DANA INTERNACIA STUDENT-KOMITATO, La universitato, Sct. Pederstraede 19, Kopenhago K., Danlando.

Francujo

Feriaj kursoj (vidu p. 133 en la Maja n-ro). Ilin antaŭos aldona periodo: Turisma Internacia Renkonto, 1–14 julio. Informojn de F-ino J. Dedieu, 3 rue Arzac, TOULOUSE, Francujo.

Komerca uzado. La fama firmo *Manufacture Francaise d'Armes et Cycles de Saint-Etienne*, kiu fabrikas

ĉaspafilojn, biciklojn, kudromaŝinojn, k.t.p. havas inter sia oficistaro kelkajn geesperantistojn (i.a. S-rojn Thevenin kaj Amblard, FDoj de U.E.A.). Ĉiujare ĝi eldonas dikan multbilden katalogon, kiu pesas preskaŭ unu kilogramon. La teksto estas franc-lingva, sed ĝi sciigas pri la kondiĉoj de vendado al eksterlando per kvar naciaj lingvoj kaj Esperanto. Sendu 4 internaciajn respondkuponon por kovri la afrankon (la katalogo mem estas senpaga); skribu Esperante al Manufrance, Saint-Etienne (Loire), Francujo.

Germanujo

Ĉefdelegito. Nur kelkajn monatojn post la fino de la milito S-ro Oscar Bünemann en Hamburg, kiel UEA-peranto por la Brita Zono, komencis rekolekti UEA-membrojn en Germanujo. Li poste estiĝis nia Ĉefdelegito por la tuta lando kaj en tiu ofico tre bone laboris por la asocio. Nun pro premo de laboro kaj laceco li eksiĝis, kaj ni publike dankas al li pro lia sindona laboro kaj la bonaj rezultoj atingitaj.

La nova Ĉefdelegito estas S-ro Friedrich Helfers, Postschliessfach 165, Karlsruhe (poŝtĉekkonto Karlsruhe 24506), al kiu Germanaj membroj de nun sendu kotizojn kaj administrajn informojn.

Gvatemalo

Propagando. Konstante aperas artikoloj pri Esperanto en ĵurnaloj, eĉ en la Bulteno de la Universitato.

Italujo

Grava eksperimento ĉe Radio Roma (vidu ankaŭ p. 190). Laŭ iniciato de *Scienca Revuo* en la Esperanta dissendo de la **6-a de Junio** okazos grava fonetika eksperimento por

esplori kiuj estas la sonoj plej klaraj kaj ne konfuzeblaj. Tiucele estos diktataj 150 prov-silaboj; ĉiu silabo estos diktata dufoje (per vira kaj per virina voĉoj). Ĉiu aŭskultanto skribu, per esperantaj literoj, la kaptitajn silabojn tiel kiel oni aŭdis (aŭ kredis aŭdi) ilin; ĉiukaze nepre oni skribu ion. Bonvolu sendi la diktaĵon al:

Radio Roma (Esperanta Voĉo),
Via Veneto 56,
ROMA, Italujo.

Pro la seriozeco kaj graveco de la eksperimento, oni petas multnombran partoprenon.

Pollando

Memorige al la Majstro. Bela suna aprila mateno. En la korto de juda tombejo en Varsovio kolektiĝas samideanoj, ankaŭ aliurbaj, kiuj venis viziti la tombon de D-ro Zamenhof okaze de la 35-a datreveno de lia morto.

Kiel reprezentantino de la familio de Zamenhof ĉeestas S-ino Wanda Zamenhof. Venas delegacio de Pollanda Esperanto-Asocio: la ĝenerala sekretario, S-ano Dratwer kaj la vicprezidanto, S-ano Monkiewicz, portantaj grandan belan florkronon kun rubando, havanta Esperantan surskribon. Ili metas ĝin sur la tombon, kiun feliĉe ne difektis la milito—nur pluvo kaj neĝo iom grizigis la belan skotan graniton de la monumento.

Samideanoj-fotografantoj celas siajn aparatojn por kaptita ornamitan monumenton, super kiu majeste flirtas granda standardo de la loka Esperanto-grupo.

S-ano Monkiewicz malfermas ceremonion, parolante en la nomo de

daŭrigo sur p. 184

James D. Sayers :

Mia Unua Mondo Jam Mortis

KIAM mia tre estimata amiko, Mason Stuttard, sugestis ke mi verku artikolon pri mia “junaĝo, kiam Usono estis ekburg-onanta”, mi devis rideti je tiu ŝerco pri mia aĝo, ĉar en ĉi tiu jaro 1951 Usono jam ekzistas kiel sendependa nacio 176 jarojn. Mankas al mi ankoraŭ kelkaj jaroj por atingi tiun maturan aĝon !

Sed . . . atentu ! Mi pripensis la sugeston dum kelkaj tagoj kaj iom post iom la ideo ŝajnis ne tiel ŝercinda kiel antaŭe. Kiam mi komencis pripensi la travivaĵojn de miaj infankaj junul-aĝoj, mi alvenis al la konsterna konstato, ke miaj plej fruaj jaroj en la granda praarbaro de norda Louisiana ne estis multe diferencaj de tiuj de mia praavo en la praarbaro de Virginio tuj post la Usona revolucio. Penso post penso sekvis kiel ĉeneroj en longa ĉeno.

Mi devis konfesi, ke la vivo de nia popolo, almenaŭ ekster la grandaj urboj, ŝanĝiĝis tre malmulte inter la jaro 1775, kiam eksplodis la Usona revolucio, kaj la lastaj jaroj de la 19a jarcento, kiam mi estis juna knabo. Certe por miaj gepatroj kaj najbaroj dum mia plej frua junaĝo, la vivo ne rimarkeble diferencis de tiu pli frua pionira epoko de mia praavo. Ni ankoraŭ teksadis grandparte niajn vestojn ; ni konservis la cindrojn de la kamento en bareloj por poste surverŝi sur ilin akvon, kiu malrapide trafiltris kaj elfluis sube kiel lesivo per kiu ni faris bonan sapon. Ni faris la sapon per kunmikso kun graso. Nia freŝvianda provizo estis ĉiam tie en la granda arbaro, atendanta niajn pafilojn. Ni muelis nian grenon en

la kruda duobla ŝtonmuelilo por akiri nian provizon da faruno ĉiusemajne. Dum malvarmegaj vintrotagoj (maloftaj en Louisiana) ni mortigis niajn porkojn kaj poste konserve fumaĵis la pecojn, kiujn ni pendigis en speciala *fumdomo*.

Kiamaniere mi povas bildigi por la juna generacio de hodiaŭ la miraklajn ŝanĝojn kiuj okazis tiel rapide dum la lasta duonjarcento ? La gejunuloj en la civilizita mondo certe legas la historion kaj tial scias, ke iam dum la pasinteco oni ne havis aŭtomobilojn, telefonojn, radio-aparatojn, aeroplanojn kaj multajn aliajn ilojn kaj aĵojn, kiuj hodiaŭ tiel multe agrabligas—kaj komplikas—la vivon de homoj. Tamen ĉu ili—ja vere, la malpli junaj homoj—povas kredi nun, ke dum la vivo de multaj jam vivantaj homoj la plej elstaraj mirakloj de la hodiaŭa civilizo aperis el nenio, almenaŭ el la imagpovaj spiritoj de inventistoj ?

* * *

Mi bone memoras amuzan okazaĵon, kiu okazis proksimume dum mia sepa jaro. Maljuna farmisto alvenis ekscitita iun sabatan posttagmezon en nia vilaĝo. Li haltis antaŭ grupo de siaj konatoj inter kiuj estis iu spritulo, kiu ĉiam pretis *fabriki* pli grandan mensogon ol iu ajn alia rakontanto. La maljuna farmisto rakontis : “Aŭskultu, najbaroj ! Mi vidis tute nekredeblan vidindaĵon en mia kampo hodiaŭ matene. Tie estis metrolonga reĝkolubro, kiu jam duone englutis *mokasen*-serponton pli grandan ol sin mem ! Ĉu iu el vi iam vidis tian nekredeblan aferon ? Se

mi ne estus vidinta ĝin per miaj propraj okuloj, mi certe ne povus kredi tion !”

“Ho, certe, Onklo Johano,” respondis la spritulo, elŝpruciginte tabakkraĉaĵon, “mi travagadis mian kampon antaŭ kelkaj tagoj kaj mi vidis du serpentojn, kiuj interluktis. Mi haltis kaj rigardadis ilin por konstati, kio okazos. Nu, Onklo Johano, ĝi certe estas nekredebla



(Kliŝo : Esperanto—Kurier)

J. D. Sayers en Germanujo, 1951. Je 19 junio 1922 S-ro Sayers faris la unuan paroladon pri kaj en Esperanto de radio-stacio (Stacio W.J.Z., Newark, N.J., Usono)

afero, tamen tiuj du serpentoj komencis gluti unu la alian. Ili komencis ĉe la vostoj. Ili englutis kaj englutis, ĝis restis fine nur la du kapoj !”

La maljunulo, kiu unue tiel avide ekaŭskultis la komencon de la rakonto en videbla espero ricevi konfirmon pri sia propra ŝajne dubinda rakonto, furioziĝis kaj formarŝis.

Dum tuta jaro Onklo Johano rifuzis rekoni amikemajn salutojn de la

spritulo, kaj neniam salutis aŭ alparolis lin.

Post proksimume unu jaro, Onklo Johano vizitis urbeton dudek kvin mejlojn for. La sekvantan tagon li denove estis en sia hejma vilaĝo, denove ekscitita pro nova *nekredebla afero*. Ĝuste tie, sur la sama verando de vendejo, estis la spritulo kun la grupo de najbaroj *maĉantaj la ĉifonon* (=interbabilantaj). Alparolinte la grupon sen eĉ rekona rigardo al la spritulo, Onklo Johano ekscitite deklaris :

“Mi estis hieraŭ en Eldorado kaj vidis veran miraklon, ĝuste kiel oni profetas en la Biblio. Tie, kontraŭ muro en vendejo oni havas skatol-aparaton, kiu estas kunligita al metalfadeno. Tiu metalfadeno, oni diris al mi, etendiĝas de Eldorado ĝis Kamdeno, tridek mejlojn norde. Oni invitis min paroli per ĝi al iu ajn persono en Kamdeno. Hazarde, mi konas viron en Kamdeno kaj oni alvokis lin al la aparato en Kamdeno. Tiam okazis la miraklo ! Mi ekkonis la voĉon de mia amiko ; alie mi certe ne estus kredinta, ke mia voĉo aŭ ies ajn voĉo, povus transvojaĝi nur per metalfadeno ian distancon, des pli ne tridek mejlojn ! Oni nomas la aparaton telefono. Vere la epoko de mirakloj alvenis !”

Tiam la spritulo ekparolis dum Onklo Johano tolereme sed suspektme aŭskultis : “Jes, Onklo Johano, mi aŭdis pri tiu telefon-aparato, kaj mi kredas pri ĝia efikeco. Mi legis hieraŭ en la urba gazeto ankaŭ pri alia mirakla afero, kiun oni inventis. Tio estas ia nova fiakro, kiu ne bezonas ĉevalojn por tiri ĝin. Oni nur enverŝu iom da lamppetrolo kaj tiu damninda freneza fiakro forkuras tiel rapidege, ke neniu ĉevalo povus egali ĝin. Jes, sinjoroj, la epoko de

mirakloj vere alvenis !”

Dum momento Onklo Johano alrigardis la spritulon. Oni povis vidi, ke la pia maljunulo interne baraktas por ekregi sin. Finfine li eksplodis ; “Junulo, vi Dubema Tomaso ! Vi, damninda ŝerculo ! Neniam plu mi alparolos aŭ ekkonos vin ĝis vi mem iros al Eldorado kaj provos tiun telefonaparaton, kaj revenos por peti mian pardonon ! Lastan jaron vi ŝercis pri mia reĝkolubra rakonto, kvazaŭ mi mensogis, kaj mi devis peti aliajn, honestajn homojn, ĝis mi trovis tiujn, kiuj jam estis vidintaj similajn nekredeblajn okazaĵojn !” Li furioze finparolis kaj foriris, nevolanta aŭskulti dum la spritulo insiste deklaris, ke ĉifoje li ne ŝercis . . .

Multa tempo pasis antaŭ ol Onklo Johano eksciis pri la aŭtomobilo kaj pardonis la spritulon.

* * *

Tio vere okazis en mia hejma vilaĝo ĉirkaŭ la jaro 1895. Dum mia antaŭnelonga restado transmare, mi telefone alvokis parencojn en tiu vilaĝo el Londono, kaj el Frankfurt-am-Main en Germanujo kaj babilis kun ili kvazaŭ mi estus en Eldorado alparolanta ilin en Kamdeno. Tra tiu vilaĝo hodiaŭ mil aŭtomobiloj en unu tago ruliĝas sur betonpavimita vojo, kie antaŭ kvindek jaroj estis profunda koto dumvintre, aŭ polvo somere, trairebla nur per besttirataj veturiloj. En ĉiu vilaĝhejmo tie estas ne nur telefonaparato, sed radio- aŭ televid-aparatoj per kiuj la enloĝantoj ekscias pri la okazaĵoj en la tuta mondo nur kelkajn horojn post la okazo. Nur dekkvin kilometrojn for estas moderna flughaveno de kiu mi povus eniri aeroplanon kaj post malpli ol tridek horoj mi povus surteriĝi en Londono, Parizo aŭ Stockholm, simile kiel mi post la Berna Kongreso en

aŭgusto 1947 eniris aeroplanon en Parizo lundon matene kaj matenmanĝis kun mia edzino en Nov-Jorko la sekvantan matenon.

Mi povus fari ankoraŭ mil preskaŭ nekredeblajn komparojn de la nuna tempo kun la vivkondiĉoj de antaŭ kvindek-sesdek jaroj, sed citos nur unu. Ni aŭdas multe pri la mekanikaj mirindaĵoj, sed tre malmulte pri la preskaŭ silentaj atingoj de niaj sindonaj nobluloj, tiuj homoj kiuj batalas senĉese kontraŭ la grandaj malamikoj de la homaro, la diversaj malsanoj, kaj la kunulo de la malsanoj, la malsato. Tiuj nobluloj estas la kurac-scienculoj kaj la agrikultur-scienculoj, kaj iliaj taskoj ofte interimplikiĝas, precipe sur la tereno de la insekto-reguligo.

Dum miaj infanjaroj sennombre multaj personoj tra la plej civilizitaj partoj de la mondo mortis de tifo, tifeca febro, malario, flava febro, de diversaj tipoj de pneŭmonio, de tuberkulozo, kaj de mil aliaj malsanoj. Hodiaŭ verŝajne dek mortas, eble malpli ol dek, kie cento mortis antaŭ kvindek jaroj. Danke al la rapidege antaŭeniranta kurac-scienco kaj al la evoluanta nutraĵ-scienco, la homoj povus vivi hodiaŭ en mirakle pli sekura, pli feliĉa mondo. Tamen super ni ŝvebas unu nigra ombro !

Malgraŭ nia miraklo-faranta scienco neniu scienculo ĝis nun eltrovis kuracilon por stulteco, por la stultuloj kiuj volas perforte regi la homaron, por la stultuloj kiuj ne povas rekoni la belecon de Esperantismo, de Homaranismo, de la Homfratismo.

Ke Dio kompatu nin, etajn estaĵojn, plenajn de memfido, fanfaronemajn pri *niaj* modernaj mirakloj, sed tiel senpovajn kontraŭ la monstra malamiko, la militspirito

daŭrigo sur p. 173

Frank Merrick :*La brita muziko*

Ni bonvenigas la jenan kontribuon de Frank Merrick, konata koncertartisto kaj virtuoza de la piano. Pere de siaj pianoprezentoj en la B.B.C. kaj per siaj kontribuoj al fakrevuoj, Frank Merrick ĝuas jam internacian reputacion. La Esperantistoj havas kaŭzon gardi varman memoron pri nia eminenta samideano, unue pro lia valora kontribuo al la faka terminologio en kunlaboro kun S-ro M. C. Butler (*Muzika Terminaro*), kaj due pro la prezento de la Greig'a Konĉerto en A minora kun la Bournemouth Municipal Orchestra (dirigento Rudolf Schwarz) okaze de la 34-a U.K. en Bournemouth, tiu impona kaj por kongreso unika travivaĵo en kiu Frank Merrick starigis novan normon de virtuozecko ĉe la nomita verko.—M.S.

EN Britujo oni amas kaj komprenas muzikon pli bone ol multaj fremdlandanoj supozas. Interalie nia muziko havas siajn fortajn radikojn en riĉa tradicio de folkloraj kantoj. Pri tio la tri landoj—Irlando, Skotlando kaj Kimrujo—konservis la fieron kaj famon pli bone ol Anglujo, kie la tradicio ŝajnis preskaŭ forvelkinta antaŭ la neforges-eblaj laboroj de Cecil Sharp je la komenco de la nuna jarcento. Sharp kolektis centojn da tradiciaj kantoj de granda beleco kaj intereso, plejparte de maljunaj gevoj kiuj ofte hezitis kanti al li kaŭze de la malpligrandiĝo de estimo pro la “malsaĝaj malnovaj kantoj” montrita de la pli juna generacio. Feliĉe li bone sciis kuraĝigi tiujn maljunulojn kaj venki ilian hezitemon. Rigardataj entute, la Britaj folkloraj kantoj posedas individuajn trajtojn kaj altgrade elvolvitan senton de melodia formo.

En la kampo de skribita muziko niaj komponistoj faris fruan komencon. Poste ili ĝuis oran epokon dum la regado de Reĝino Elizabeto I., kiam Tallis (ĉ. 1510–1585), Byrd (1543–1623), Gibbons (1553–1625) kaj aliaj elŝutis malŝpareme preĝejan muzikon, madrigalojn kaj belajn ofte komplikajn pecojn por arĉinstrumentoj kaj klavceno* (tiam nomita *virginals*).

* Klavceno—instrumento kun piansimila klavaro, tamen ĉe kiu la kordoj estas tirataj sed ne frapataj.—Red.

Poste la geniulo Purcell (1658–1695) treege pliriĉigis nian heredan trezoron per majstraj operoj, kantatoj,† kantoj kaj instrumentaj verkoj. En la dekoka jarcento la grandega sukceso de Handel en Anglujo ŝajnis mal-kuraĝigi la sendependan elvolvadon de niaj komponistoj. Je la fino de tiu jarcento alvenis la Irlanda komponisto John Field (1782–1837). Kiel bone sciate, li estis la unua kiu verkis nokturnojn, sed Chopin ne nur ŝuldis al li tiurilate. Field multe influis la polan geniulon per siaj konĉertoj,‡ unuflanke per ilia muzika enhavo kaj duaflanke per ilia majstra uzado de la piano. Chopin ame uzis tiujn ĉi konĉertojn en sia pianinstruado.

Post Field alia granda sukceso, tiu de Mendelssohn, ŝajne malkuraĝigis komponistojn denove, kvankam oni ne devas nepre kaj senrezerve akcepti tiun ĉi historian interpreton de la influo (alie tre inspira) de Handel kaj Mendelssohn. La ideo certe ripetiĝis tre ofte, parte kiel speco de senkulpiĝo, sed eble ĝi povas esti troigo.

Estu kiel ajn, nia krea renaskiĝo en la muzika kampo prokrastiĝis sed finfine kaj parte sur la bazo de la noblaj streboj de Parry, Stanford kaj aliaj, la naciaj muzikaj kreaĵoj iĝis denove individuaj kaj reprezentaj

† Kantato—hora verko, simila al oratorio (*Muzika Terminaro*).

‡ Konĉerto—verko sonateca kun solo-instrumento kaj orkestro.—Red.

laŭ karaktero. La plej gravaj nomoj en tiu ĉi renaskiĝo estas Elgar, Holst, Vaughan-Williams, Ireland kaj Bax. Multaj aldonus Delius, kvankam aliaj dirus, ke li ne estas tute Brita; certe li ofte uzas anglan muzikan idiomon (por tiel diri) kaj multe influis preskaŭ ĉiujn niajn komponistojn, kiuj sekvis lin. La plej gravaj verkoj de Elgar, Delius, Holst kaj Vaughan-Williams estas orkestraj (kun aŭ sen ĥoro), pri kiuj ni ŝparu spacon evitante longajn listojn. Vaughan-Williams uzas nian folkloran heredaĵon pli ol la aliaj, kaj kun mirindaj simpatio kaj sukceso. Ireland tre multe, kvankam tute ne ekskluzive, kaj tre sukcese, verkis por la piano, kelkfoje kun aliaj instrumentoj (violono, ĉelo k.t.p.) kaj ankaŭ kontribuis multajn belajn solkantojn. Bax verkis ses simfoniojn, kvar sonatojn por piano kaj multajn ĉambrajn komponaĵojn kun kaj sen piano.

Neeviteble opinioj multe varias pri la diversaj kvalitoj de tiuj, kiel pri aliaj kreaĵ artistoj; ekzemple mi mem tre alte taksas la stilon en si, kaj en multaj verkoj de Bax, trovas grandan inspiran belecon kaj en iliaj detaloj de melodio kaj harmonio kaj ankaŭ en ilia arkitektura formo kaj serĉo de celo. Spertaj amikoj kontraŭe asertas mankon de ekonomio diversspeca kaj memkritikemo, opinioj por mi tute senfundaj.

Pli junaj estas William Walton (1902--...), Alan Rawsthorne (1905--...) kaj Benjamin Britten (1913--...). De Walton la plej konataj gravaĵoj estas dramema kantato *Belshazzar's Feast*, unu simfonio kaj konĉertoj por aldviolono kaj violono resp. el kiuj la lastnomita estis unue prezentita en Usono per Heifetz kaj en Anglujo per Henry Holst. Rawsthorne estas neordinare serioza

kaj malmulte konsideras la grandan publikon. Li jam gajnis la respekton de tiuj, kiuj favoras tre modernan stilon de komponado, kvankam li estas certe malpli nekomprenebla ol kelkaj el la plej modernaj de modernuloj. Ŝajnas tro frue, provi trafan juĝon pri la estonta valoro de Rawsthorne kaj Britten. Britten havas interalie sorĉistan instinkton por novaj instrumentaj efektoj, sed estas iom malfacile diri, ĉu tiu povo estas senescepta beno. Eble liaj plej rimarkindaj verkoj estas tri operoj *Peter Grimes*, *The Rape of Lucrecia* kaj *Albert Herring*. Ilia graveco estas por ni tiom pli granda kaŭze de la fakto, ke operoj ne tre abunde floras en la tero de niaj insuloj. Ĝis la nuna tempo la ŝercemaj operoj de Gilbert-kaj-Sullivan estis preskaŭ la sola alproksimiĝo al vere nacia opera tradicio. Nia publiko ĝuas operojn, sed plejparte tiujn de la fremdlandaj majstroj. Parto de la kaŭzo de tio ĉi estas verŝajne tio, ke ĝis antaŭ kelkaj jaroj serioza muziko kaj opero ricevis nenian monan helpon de publikaj kasoj, kvankam muzeoj kaj artgalerioj ricevis dum tre multaj jaroj. Nun multe ŝanĝiĝas iom post iom; ni vidos kio okazos, opere kaj alie.

Kiel muzikamantoj ni estu juĝataj laŭ la inteligentaj spertaj miloj prefere ol laŭ la dekmiloj aŭ milionoj. De la laste nomitaj estas tute neracie atendi maturan guston en aferoj kiuj postulas larĝan spertan vidpunkton kaj paciencan volon mediti juĝojn. Tiu malgranda publiko en Anglujo estis ĉiam preta aŭskulti la verkojn de fremdaj landoj, tiel montrante vere universalan vidpunkton, kaj tre frue akceptis novaj stilojn ekzemple, Beethoven, Wagner, Debussy, Sibelius k.t.p. unu post la alia.

En la kampo de muzika prezentado

la Britoj dum tri-kvar jarcentoj multe kantis hore, unue neakompanitajn madrigalojn k.t.p. Kiam la Hispanaj korteguloj venis al Anglujo kun la Reĝo Filipo II-a ili multe plendis en siaj leteroj al Hispanujo pri tio, kiel ili devis senĉese aŭskulti muzikon ĉie, kien ili iris. En pli proksimaj tempoj tre grandaj ĥoroj (kelkfoje tro grandaj), ofte el du-tri cent voĉoj, kantis en verkoj de Handel, Mendelssohn (poste Bach), Brahms, Dvořák, Elgar, Vaughan-Williams k.t.p.

Nun estas ankaŭ feliĉa epoko por orkestroj, de kiuj multaj estas de granda merito ne nur en Londono sed ankaŭ en diversaj provincurboj. Ĉu sekvo aŭ kaŭzo, la publiko de fervoraj amantoj, de orkestra muziko tre pligrandiĝis dum la pasinta kvaron-jarcento.

Ĉambra muziko estas bedaŭrinde malpli ŝatata malgraŭ la bonegaj

servoj de memoferemaj artistoj, kiuj laboras senĉese en tiu ĉi grava sfero de muzika vivo kaj edukado. Verŝajne la plej feliĉa epoko por ĉambra muziko, almenaŭ en Londono, estis en la tempo de la fama violonisto Joachim, kiam la "Popular Concerts" (ame mallongigita "Pops") ĝuis grandan favoron de la seriozuloj.

La diversaj muziklernejoj en Britujo meritas grandan dankon. La kvalito de niaj komponistoj, artistoj kaj instruistoj ŝuldiĝas nekalkuleble al ilia senĉesa sindono.

Entute ni kredas havi ion valoran, kion kontribui al la mondo, dum ni estas danke pretaj ricevi de ĉiu angulo de la mondo tion kion oni bonvole kontribuas al ni.

Konfucio opiniis, ke la esenco de lia instruado estas la reciprokeco, kaj ni povas tute konsenti kun tiu granda saĝulo rilate al la bela arto de la muziko.

daŭrigo (de p. 170)

kiu ankoraŭ trovas tiom da nutraĵo el la rikoltoj de interhomaj malestimo, suspekto, envio kaj malamo !

Jes vere, mia unua malnova mondo mortis. Ĉu mia mirakloplena nova mondo, tiel' ege kapabla krei abundon kaj belecon por ĉiu homo, ĉu ankaŭ tiu mortos baldaŭ ? La pesimismo respondas : "Jes, ĝi meritas la morton pro sia stulteco !" La optimismo, kredante ke la Kreinto ne kreis la Teron kaj la homaron por sencela, finfina detruo, respondas : "Eble venos kruelega, lasta militego, sed justeco daŭre venkos. Tiu, kiu alprenos la glavon, mortos per la glavo, sed la humilaj, senkulpaj, homfratemaj postvivantoj konstruos la novan, daŭran mondon de la eterna, bclega estonteco !"

W. Shakespeare :

Kanto de Ariel

(el The Tempest)

*Sub kvin klaftoj via patro restas :
La ostaro jam koralosema ;
Perloj en la okulkavoj estas ;
Ĉiu korpoparto forvelkema
Aliiĝas pro marŝanĝo ia
Al maraĵo luksa kaj magia.
Lin niksinoj mortlamentas hore :
Jen ! mi aŭdas ilin—
Klin ! Klan ! Sonore !*

(Trad. Brendon Clark)

Niaj Kunlaborantoj

Luigi Minnaja, Ĉ.D. de U.E.A. en Italujo

KIOM ofte, legante pri la Esperantistiĝo de samideano, oni konstatas la allogon de la ideo de frateco en la unua interesiĝo? Malgraŭ tio ke multaj defendas la starpunkton, ke lingva diverseco ne estas la kaŭzo de malpaco, la fakto de reciproka kompreno kiel perilo de paco daŭre sin trudas.

Tiel estis ankaŭ ĉe Luigi Minnaja kiam li legis artikolon en 1926 pri Esperanto kiel fratigilo de la homaro, kaj li eklernis la lingvon. Jam de la komenco li fervoris kaj aktivis por nia afero kaj de 1928 estas sekretario de la Roma Esperantista Grupo. Kongresanoj de la 27-a U.K. memoras la brilan sukceson de tiu aranĝo, sed kiom el ili memoras, ke la agema ĝenerala sekretario estis ĝuste Luigi Minnaja? De 1946 li estas ĉefdelegito de U.E.A. en sia lando. Precize kaj akurate li laboras. Lia servado estas modelo.

Multaj Esperantistoj certe memoras la "oran epokon" de la Esperantismo en Italujo, kiam oftaj kaj bonegaj dissendoj en la radio donis ĝojon al miloj da aŭskultantoj. Al tiu periodo apartenas ankaŭ la intereso de turismaj organizaĵoj, kaj ni devas danki al Luigi Minnaja pro la bona traduko de la gvidlibro *Romo kaj ĉirkaŭaĵoj** eldonita de Itala Institucio pri Turismaj Industrioj, kaj pro multaj turismaj faldfolioj en Esperanto. Ni salutas la novan aktivan partoprenon kaj kunlaboron de nia samideano en la novaj unuarangaj elsendoj en Esperanto de Radio Roma.


* Bedaŭrinde nun elĉerpita.



Laŭ profesio S-ro Minnaja estas ŝtata oficisto. Li estas edzo kaj dividas la feliĉon kaj ĝojon de sia Esperantista vivo kun edzino kaj du filoj, Nikolao kaj Karlo. Jam en Munkeno Nikolao montris sian talenton sur oratora tereno, dividante la unuan premion en la Oratora Konkurso de U.E.A. Ni ne dubas, ke ankaŭ Karlo siatempe faros belajn kontribuojn al nia afero por apogi la familian tradicion. En la Centra Oficejo en Heronsgate oni memoras okazon, kiam S-ro Minnaja dum mallonga tempo ne povis plenumi la ĉefdelegitan taskon. Kun ĝojo ni konstatis, ke S-ino Minnaja same modele kaj same precize kaj orde faris la laboron. Vere S-ro Minnaja devas esti feliĉa kaj fiera homo!

Al li direktiĝas nia danko pro sindona kaj bona laboro farita sentrude, sen parado, sed kun sincera bonvolo.

M.S.



Centro de Esploroj kaj Dokumentado

300, West End Lane, London, N.W.6, Anglujo

La statistiko pri la Esperanto-Movado

En tiu ĉi numero de nia revuo estas publikigita statistika tabelo pri la stato de la Esperanto-Movado la 1-an de Junio 1951 (vidu p. 176–177).

La tabelo kaj la tuta laboro farita por kunmeti ĝin, nepre postulas kelkajn komentojn kaj klarigojn :

(1) La laboro por kunmeto de la statistiko komenciĝis en Februaro 1950, kiam estis dissenditaj la unuaj cirkuleroj kaj enketaj folioj al la landaj asocioj kaj al diversaj elstaraj esperantistoj, kompetentaj pri la afero. La laboro finiĝis la 1-an de Marto, 1952.

(2) La taskon kunmeti la statistikon entreprenis unue la Informa Fakto de U.E.A. Ĝin daŭrigis kaj finis la Centro de Esploroj kaj Dokumentado. Entute kunlaboris 92 diversaj instancoj de nia Movado kaj unuopaj esperantistoj. Ĉiuj kunlaborantoj ricevis enketajn foliojn kaj ili estis petitaj respondi kiel eble plej objektive, laŭ ebleco post esploro de la afero, interkonsiliĝo kun aliaj kompetentaj personoj, trastudo de dokumentoj k.t.p. En diversaj landoj pluraj kunlaborantoj laboris memstare, sendepende unu de la alia, kaj plejparte la rezultoj de iliaj enketoj estis samaj aŭ kun nur malgrandaj diferencoj, kio pravas la objektivecon de la esploro. Se ekzistis diferencoj, la C.E.D. prenis mezajn ciferojn ĉiam, kiam temis pri proksimumaj respondoj. Tiamaniere la statistiko donas sufiĉe realan bildon pri la stato de la Movado en la 32 menciitaj landoj.

(3) El kelkaj landoj, ekzemple el Sovetunio, Ĉinujo, Bulgarujo, estis absolute neeble ricevi informojn. Kelkaj aliaj landoj, ekzemple Grekujo, Aŭstrujo, Japanujo, ne respondis al enketo malgraŭ la plurfojaj urĝigoj. Tia neglektado de tiu ĉi grava laboro fare de kelkaj landaj asocioj kaj de iliaj respondecaj gvidantoj multe malhelpis la kunmeton de la statistika trarigardo kaj la atingon de pli granda precizeco. La C.E.D. intencas entrepreni en la jaro 1954 novan enketon por konstati la progreson de la Movado. Estas espereble, ke tiu laboro estos pli konsciencie subtenita de la organizaĵoj, al kiuj la Centro sin turnos por tiu celo. La demandoj estos la samaj kiel en la nuna enketo, kaj estus tre utile, se la Esperanto-organizaĵoj komencus havigi jam nun la necesan materialon por la respondoj.

(4) La lasta grava provo pri Esperanto-statistiko estis tiu de D-ro Dietterle. Ĝi koncernis la staton de nia Movado en la jaro 1926. Laŭ tiu statistiko, en la tuta mondo ekzistis 126,576 esperantistoj, pri kiuj ni tiam havis fidindan scion. El ili 41,751 estis organizitaj en 1,776 grupoj. La grupoj okazigis en la jaro 1926 entute 2,531 kursojn. Ni devas ne forgesi, ke tiu statistiko rilatis al epoko, kiam Esperanto povis libere disvastiĝi en ĉiuj landoj de la mondo, do, kiam diversaj reĝimoj ne malpermesadis la ekziston de niaj organizaĵoj aŭ la instruadon de la lingvo. Se oni komparas tiujn ciferojn kun la nun

STATISTIKO

pri la stato de la Esperanto-Movado

<i>I</i>	<i>II</i>			<i>III</i>	<i>IV</i>	<i>V</i>		
	<i>a</i>	<i>b</i>	<i>c</i>			<i>a</i>	<i>b</i>	<i>c</i>
1. Argentino ..	300	150	450	600	1,200	9	2	11
2. Aŭstralio ..	100	50	150	200	300	4	2	6
3. Bolivio ..	2	78	80	24	65	—	2	2
4. Brazilo ..	1,750	—	1,750	50,000	10,000	30	15	45
5. Britujo ..	3,000	1,000	4,000	10,000	63,000	3	94	97
6. Ĉeĥoslovakujo	67	2,966	3,033	12,000	29,200	3	96	99
7. Ĉilio ..	3	30	33	30	50	—	1	1
8. Danlando ..	1,100	500	1,600	3,000	3,000	—	35	35
9. Egiptujo ..	100	13	113	100	180	1	2	3
10. Belgujo— Flandra parto	600	400	1,000	4,000	4,000	6	11	17
11. Finnlando ..	300	700	1,000	5,000	nekonate	4	10	14
12. Francujo ..	2,000	1,500	3,500	20,000	80,000	1	100	101
13. Germanujo	300	3,900	4,200	20,000	10,000	30	120	150
14. Gvatemalo ..	1	—	1	5	15	—	—	—
15. Hispanujo ..	350	520	870	3,000	2,000	2	10	12
16. Hungarujo ..	100	4,900	5,000	5,000	2,500	—	14	14
17. Irlando ..	100	—	100	200	nekonate	3	—	3
18. Islando ..	10	190	200	300	600	3	1	4
19. Italujo ..	560	215	775	7,000	8,000	1	28	29
20. Izraelo ..	80	70	150	400	50	1	2	3
21. Jugoslavujo	1,400	100	1,500	8,000	9,000	13	16	29
22. Maroko ..	20	10	30	70	100	—	2	2
23. Nederlando	1,000	3,500	4,500	75,000	4,000	10	130	140
24. Nord-Ameriko	828	370	1,198	25,000	16,000	—	35	35
25. Norvegujo ..	636	50	686	7,000	nekonate	—	25	25
26. Novzelando	120	80	200	400	1,250	1	8	9
27. Pollando ..	1,200	—	1,200	10,000	9,000	2	32	34
28. Portugalujo	40	210	250	3,000	100	1	6	7
29. Svedujo ..	3,000	1,000	4,000	10,000	36,500	50	70	120
30. Svislando ..	300	30	330	400	180	2	10	12
31. Urugvajo ..	28	22	50	300	350	1	—	1
32. Venezuelo ..	3	50	53	50	40	—	4	4
KUNE ..	19,398	22,604	42,002	280,079	290,680	181	883	1,064

Klarigaj notoj pri la statistika tabelo

- I.* Nomo de la lando.
- II.* Nombro de la organizitaj esperantistoj
 (a) en organizaĵoj aliĝintaj al U.E.A. (b) en organizaĵoj nedependaj de U.E.A. (c) entute.
- III.* Proksimuma nombro de personoj, kiuj povas kompreni skribitan tekston en Esperanto kaj, en okazo de bezono, eĉ iom paroli la lingvon.
- IV.* Nombro de lernolibroj, kiuj disvendiĝis inter la finiĝo de la dua mondmilito kaj la 1-a de Junio 1951.
- V.* Nombro de lokaj organizaĵoj
 (a) veraj societoj kun propraj ejo, biblioteko, legejo kaj regulaj semajnaj kunvenoj
 (b) grupoj sen propra ejo, sed kun regulaj kunvenoj (c) entute.

la 1-an de Junio, 1951

VI			VII					
a	b	c	a	b	c	d	e	f
11	210	55	Jes	13	5	5	1,500	5,000
8	100	25	Jes	3	2	—	—	3,000
3	35	12	Ne	24	8	14	1	3,000
150	2,500	600	Jes	2,000	400	25	5,000	500,000
103	2,434	500	Ne	978	10	nekonate	10,000	500,000
90	1,850	900	Ne	230	2	100	45,000	500,000
2	20	10	Ne	4	4	2	—	100,000
50	500	200	Ne	200	—	—	—	100,000
14	130	80	Jes	4	—	4	1,600	3,000
7	150	40	Ne	50	2	1	—	50,000
8	100	20	Ne	—	—	10	—	nekonate
nekonate	nekonate	nekonate	Ne	nekonate	nekonate	nekonate	nekonate	nekonate
320	7,200	2,400	Jes	800	15	140	40,000	4,000,000
3	35	5	Ne	6	50	3	—	5,000
12	300	100	Jes	8	2	10	9,000	50,000
31	735	370	Ne	—	—	—	—	nekonate
5	62	43	Ne	—	—	1	300	nekonate
2	36	20	Ne	12	—	3	—	10,000
30	450	150	Jes	310	20	15	2,600	8,000,000
2	30	14	Ne	10	1	—	—	5,000
28	780	170	Jes	5	—	31	12,000	100,000
1	22	8	Ne	10	13	—	20	2,000
40	600	400	Jes	3,000	20	120	30,000	1,200,000
65	900	500	Jes	400	110	250	58,000	3,000,000
35	530	500	Jes	854	2	2	2,000	1,000,000
9	80	nekonate	Ne	100	3	20	500	1,000
13	559	500	Ne	—	—	—	—	nekonate
—	—	—	Ne	12	—	2	1,000	2,000
150	1,700	1,000	Jes	200	—	10	4,000	500,000
4	39	30	Jes	30	3	8	500	5,000
1	10	2	Jes	9	2	—	750	1,000
4	30	14	Ne	8	10	4	—	50,000
1,202	22,087	8,668	14 Jes	9,289	684	780	223,771	17,695,000

koncerne la Esperanto-movadon en la jaro 1951

VI. Nombro de gviditaj kursoj en la laborjaro 1950–1951

(a) nombro de la kursoj

(c) nombro de la personoj, kiuj finis tiujn kursojn.

(b) nombro de la personoj, kiuj aliĝis al la kursoj

VII. Propaganda laboro (informado) por la laborjaro 1950–1951

(a) ĉu la landa asocio formis apartan sektion por informado?

(b) nombro de artikoloj kaj informoj pri Esperanto, aperintaj en la nacilingva gazetaro

(c) nombro de radioprelegoj pri Esperanto en la nacia lingvo

(d) nombro de publikaj prelegoj pri Esperanto

(e) nombro de propagandaj afiŝoj, flugfolioj, broŝuroj kaj aliaj presaĵoj pri Esperanto, disdonitaj en la nacia lingvo

(f) proksimuma nombro de personoj tuŝitaj de tiu informada laboro.

publikigataj, klare vidiĝas, ke multilate ni progresis, kvankam la dua mondmilito kaj la stato post la milito grave malhelpas la disvastigon de Esperanto en ĉiuj landoj kaj malebligas ĝin en kelkaj.

(5) Koncerne la unuopajn rubrikojn de la statistiko, estas necese fari jenajn komentojn ;

(a) La rubriko II/a montras la nombron de esperantistoj, organizitaj en organizaĵoj dependaj de U.E.A. Tiu nombro estas 19,398. Sed U.E.A. havas individuajn membrojn en 42 pliaj landoj. La sumo de tiuj individuaj membroj estas entute 298 (vidu Jarlibron de U.E.A. por 1951, dua parto p. 12-14), sekve la fina cifero de la rubriko II/a estas 19,696. Tial, ankaŭ la rubriko II/c altiĝas al 42,300, kio estas preskaŭ egala al la nombro de organizitaj esperantistoj laŭ la statistiko Dietterle (41,751). Estas menciinde, ke la nombro de esperantistoj, organizitaj en organizaĵoj dependaj de U.E.A., estas iom pli granda ol montras la oficiala raporto de U.E.A. por la jaro 1950 pri la membraro. Tio estas kaŭzita de la fakto, ke pluraj esperantistoj estas kelkfoje organizitaj en tiaj organizaĵoj, sed mem ne estas membroj de U.E.A.

(b) La rubriko III rilatas al la nombro de personoj kiuj pli-malpli bone povas uzi nian lingvon. Tiu cifero, proksimuma kompreneble, estas 280,079. Laŭ la statistiko de C.K. de S.E.U., en Sovetunio ekzistis en la jaro 1927 16,066 organizitaj esperantistoj. Laŭ tio oni povas supozi, ke tiam almenaŭ 30,000 personoj sciis nian lingvon. Aldonante al tiu nombro la esperantistojn de Estonujo, Latvujo kaj Litovujo ; konsiderante ankaŭ la fakton, ke ĝis

la jaro 1941 sendube aliaj personoj lernis la lingvon; sed prenante en konsideron, ke de tiam certa nombro de esperantistoj mortis, ne estos erare taksi la nombron de esperantistoj en tiu lando je 30,000. En la jaro 1934 la "Kantona Esperanto-Gazeto" publikigis statistikon, laŭ kiu minimume 30,000 personoj finis la kursojn en Ĉinujo. Ankaŭ por tiu lando ni povas preni la ciferon 30,000 kiel sufiĉe ĝustan koncerne la nombron de personoj kiuj scias nian lingvon. Konsiderante la gravan plivigliĝon de la movado en Japanujo en la postmilitaj jaroj, ni opinias, ke ankaŭ en tiu lando ekzistas ĉirkaŭ 30,000 personoj, kiuj scias Esperanton. En la 39 aliaj landoj, kiuj ne estas menciitaj ĉi tie, nek en la statistika trarigardo, ni havas eble pliajn 10,000 esperantistojn. **Tiamaniere la nombro de personoj, kiuj scipovas Esperanton hodiaŭ en la tuta mondo estus proksimume 380,000.** Tiu cifero ŝajnas al ni sufiĉe reala. Kvankam ne impona, ĝi sendube montras seriozan progreson kompare kun la jaro 1926.

(c) La rubriko IV montras, ke en 29 landoj estis disvenditaj minimume 290,680 lernolibroj. Tiu cifero rilatas nur al organizaĵoj dependaj de U.E.A. kaj nur al la menciitaj landoj. La tuta nombro de venditaj lernolibroj devas esti multe pli granda. Tiu rubriko klare montras la grandan interesiĝon pri nia lingvo kaj ĝi ankaŭ indikas, ke, se ni povus doni al Esperanto ankoraŭ pli grandan praktikan valoron, dum nuraj kelkaj monatoj ni povus konsiderinde altigi la nombron de esperantistoj el la personoj, kiuj posedas lernolibrojn sed ankoraŭ ne ellernis la lingvon.

(d) La rubrikoj V, VI kaj VII rilatas nur al organizaĵoj dependaj de

U.E.A. La ciferoj, entenitaj en la koncernaj rubrikoj, devas esti konsiderataj kiel minimumaj. La solan escepton faras la rubriko V/a, kie, ŝajnas al ni, la enketitoj komprenis iom larĝe la signifon de la vorto "societo kun propra ejo". Fakte, bedaŭrinde, la nombro de tiaj societoj estas pli malgranda kaj niaj landaj asocioj devus dediĉi al tiu demando sian tutan atenton, ĉar sen veraj societoj ne estas imagebla pli grandskala progresado de nia lingvo.

(6) La publikigata statistiko, malgraŭ la mankoj, montras en ĉiu okazo la grandegan laboron, kiun faras niaj organizaĵoj kaj la unuopaj esperantistoj en la mondaj kadroj. Se oni konsideras, ke tiu tuta laborego estas farata preskaŭ sen financaj rimedoj, en malfavoraj cirkonstancoj de la internacia vivo, ankoraŭ pli elsaltas la fakto, ke per sindonemo kaj ofereco estas atingeblaj grandegaj rezultoj. La publikigitaj sekaj ciferoj

donu al ni ĉiuj novan kuraĝon kaj novan energion por daŭriĝi ankoraŭ pli insiste nian laboron por la Internacia Lingvo.

(7) Fine, iom da statistiko pri la statistiko : por kunmeti la statistikon de la movado estis necesa laboro de du jaroj. La Centro tiucele sendis pli ol 700 cirkulerojn kaj individuajn korespondaĵojn.

*Prof. Ivo Lapenna,
Honorofica Direktoro.*

Novaj donacoj al la CED :


	£	ŝ.	p.
Donacite ĝis la 25-a de Marto	165	6	6
The Esperanto Pub. Co., Heronsgate	5	0	0
S-ro E. Malmgren, Stockholm	5	0	0
D-ro Kempeneers, Bruxelles	5	0	0
S-ro Ribot, Marmande ..		10	0
S-ro Gueritte, Surbiton ..	5	0	0
S-ro Dalmaŭ, Hispanujo ..	1	0	0
<i>Sume la 10-an de Majo..</i>	<u>£186</u>	<u>16</u>	<u>6</u>

Internacia Konkurso 1952

Stato je 30 Aprilo 1952

Lando	Kvoto	Poentoj	%	Lando	Kvoto	Poentoj	%
1. Izraelo ..	350	495	141.4	15. Usono ..	2500	1938	77.5
2. Maroko ..	500	520	104.0	16. Britujo ..	12000	9224	76.9
3. Japanujo ..	900	845	93.9	17. Finnlando	2600	1950	75.0
4. Islando ..	400	370	92.5	18. Hispanujo	1300	975	75.0
5. Urugvajo ..	250	225	90.0	19. Italujo ..	2200	1620	73.6
6. Svislando ..	1400	1245	88.9	20. Svedlando	5200	3640	70.0
7. Belgujo ..	2300	2009	87.3	21. Norvegujo	1700	1185	69.7
8. Sud-Afriko	300	260	86.7	22. Portugalujo	800	500	62.5
9. Germanujo	3200	2765	86.4	23. Brazilo ..	4500	2754	61.2
10. Aŭstralio ..	850	710	83.5	24. Nov-Zelando	800	465	58.1
11. Danlando ..	2700	2250	83.3	25. Kubo ..	250	145	58.0
12. Francujo ..	5500	4574	83.2	26. Aŭstrujo ..	1000	575	57.5
13. Kanado ..	250	200	80.0	27. Irlando ..	250	120	48.0
14. Nederlando	4800	3770	78.5				

Enigma Konkurso N-ro 69



Solvojn oni sendu al S-ro P. H. Mooy, 28 rue Stuyvenbergh, Brussel II, Belgujo. Por ĉiu tute korekta solvo oni kutime donas 5 poentojn. Ĉiufoje la tri personoj, kiuj havas la plej altajn poentnombrojn, gajnas premion. Ĉiu MA de UEA kun la sama ŝanco povas komenci la sendon de la solvoj je kiu ajn momento.

Pliaj informoj, se dezirataj, riceveblaj de S-ro Mooy kontraŭ unu respondkuponon internacia.

Solvoj de la enigmoj en konkurso N-ro 67.

N-ro 148. Akcidento, atmosfero, brankardo, akrobato, halebardo, ambulanco, hortulano, aristokrato, individuo, karamelo. (Kelkaj aliaj vortoj eblaj.)

N-ro 149. En fremdan vazon ne ŝovu la nazon. Eĉ guto malgranda, konstante frapante, traboras la monton granitan. Al posedanto de metio mankas nenio. Fino bona, ĉio bona. Bona estas domo nova kaj amiko malnova. Inter la blinduloj reĝas la strabuloj. Okazon kaptu ĉe l' kapo ĉar la vosto estas glita. Kiam kato promenas, la musoj festenas. El du malbonoj pli malgrandan elektu. Laboro kaj pacienco kondukas al potenco.

N-ro 150. Horizontale: antaŭ + okra, obei, laste, edifa, riska, nenie, plue, ideo + prezo. Vertikale: aloo + ankri, naŭe, afiŝi, freŝa, balai, super, kies, ardeo + aero.

Gajnis la premiojn post kontrolo de la 65-a konkurso: F-ino N. Hanson (Brit.) 165, F-ino J. Dedieu (Franc) 151, S-ro F. Jelenc (Alĝerio) 151 p.

Enigmo N-ro 154: La tuto konsistas el 57 literoj kaj estas esprimo el la Proverbaro de D-ro Zamenhof.

45-10-27-25-15-5 legosigno; 8-1-16-22-34-43 monato; 34-17-10-53-19 kordmuzikilo; 20-6-50-32-18-57 vintra fenomeno; 38-30-28-41-39-43 etulo; 52-42-9-24-46-57 kortobirdo; 2-29-21-23-57 manĝaĵo; 26-4-31-34-47 apartigi; 12-46-56-57 granda vazo; 34-19-44-53-31 manĝebla riverfiŝo; 2-29-13-38-9-57 infera ŝtono; 14-7-5-56-55-57 lasta batalo; 51-36-54-50-37-43 kapkovrilo; 48-25-52-4-57 dekreto; 9-13-47-15-17 kontraŭstari; 33-40-24-11-35-3 indigni iun; 49-3-7-54-41 koloro.

Enigmo N-ro 155: 1. tria; 2. gruo; 3. lumi; 4. noti; 5. grio; 6. fako; 7. ario; 8. kato; 9. kiam; 10. tria; 11. leĝo; 12. turo; 13. arde; 14. arbo; 15. fali; 16. arte; 17. pesi.

Al ĉiu el la supraj 17 vortoj vi aldonu 2 literojn tiel ke: *a* vi povas formi novan vorton el ĉiu seso da literoj; *b* la aldonitaj literoj unu post la alia formas esprimon el la Proverbaro de D-ro Zamenhof (la solvanto mem decidu pri la sinsekvo de la literoj en ĉiu duo da aldonitaj literoj); *c* la signifo de la novaj vortoj estas:

1. rabisto; 2. marfiŝo; 3. variigi; 4. prezenti; 5. muzikilo; 6. akvujo; 7. skeletparto; 8. posedata sumo; 9. molusko; 10. antaŭsciigi; 11. bonkorega homo; 12. korp parto; 13. antikva monero; 14. provizora konstruo; 15. lasta parto; 16. malliberigi; 17. kurba linio.

ALVOKO AL OSLO

Vivreformistojn, vegetaranojn, nefumantojn, abstinulojn, naturamikojn mi alvokas al universala kongreso, por fondi fakasocion, kiu studos plibonigi la sanecon kaj plialtigi la vivaĝon, por fariĝi sana centjarulo. Interesuloj skribu al D-ro Wegener, Essen, Haus der Technik, Germanujo.

Tibor Sekelj :


La skribado de la Maja-indianoj

LA norda parto de Gvatemalo en Meza Ameriko estas la naskiĝloko de la plej alta amerika civilizo—tiu de la Maja-indianoj—kiu en kelkaj rilatoj ne nur atingis, sed eĉ superis la nivelon de siaj plej civilizitaj samtempuloj. La glora epoko de la maja-kulturo estis inter la kvara kaj la oka jarcentoj de la kristana erao. Poste la majaoj forlasis siajn urbojn kaj urbegojn por elmigri al la Jukatana duoninsulo en la nuna Meksikio. Eĉ se la du plej vidindaj maja-ruinoj estas ekster Gvatemalo—Ĉiĉen Ica' en Meksikio kaj Kopan' en Honduraso—la medolo de tiu kulturo fluas tra la praarbaroj de norda Gvatemalo, tra la orientaj valoj kaj la montaroj de la okcidento, kaj penetras la vivadon de la nun vivantaj triboj el kiuj konsistas pli ol la duono de la popolo.

Vizito al Tikal kaj al Kirigua' sufiĉas por ekhavi ideon pri la majesta arkitekturo kaj skulptarto de tiu

epoko. Tikal estis iam la plej grava urbo de la regiono. Nun videblaj estas ĉirkaŭ cent konstruaĵoj aŭ elstarantaj aŭ kovritaj de la vegetaĵaro de la tropika ĝangalo. La konstruaĵoj estas dissemataj sur teritorio de preskaŭ du kvadrataj kilometroj kaj kronas piramidojn el kiuj la plej alta atingas 70 metrojn. Se ni konsideras, ke tiuj konstruaĵoj estis nur la temploj, palacoj kaj publikaj oficejoj, kaj ke la popolo vivis ĉirkaŭe en miloj da kabanoj delonge malaperintaj, ni komprenos, ke ni troviĝas en urbo kiu iam havis cent ĝis ducent mil loĝantojn.


Kirigua' estis urbo malpli grava ; sed ĝi elstaras pro siaj belege skulptitaj ŝtonaj monumentoj el kiuj la plej granda estas 11 m. alta kaj pezas 60 tunojn. Ĉiuj monumentoj estas plenplenaj je gravuraĵoj, inter kiuj troviĝas dioj en reliefo kaj sen-nombraj hieroglifaj desegnoj majstre skulptitaj, kiuj dum jarmilo kaj



Placo en la urbego Tikal, desegne rekonstruita

duono rezistis la denton de la tempo.

Mia ravita rigardo kun admiro karesas la diojn kiuj iam regadis la destinojn de la majaoj. Kun preskaŭ religia fervoro mi rigardas la perfekte skulptitajn hieroglifojn kaj koncentras la memoron por trovi la signifon de iu desegno jam duone forviŝita de la jarcentoj.



Sur ŝtona monumento en Kirigua, figuro simila al Budho sidas meze de komplika kaj mistera ornamaĵo.

La skribado kaj ĝia enhavo

Tri specojn da fontoj ni havas por la studo de la skribado de la majaoj : la reliefojn, kiuj kovras la ŝtonajn monumentojn ; la ceramikon kun desegnoj kaj pentraĵoj ; kaj la paĝojn de la libroj nomitaj “kodeksoj”, kiuj postvivis la detruon de la hispanaj invadintoj. En ĉiuj ĉi fontoj estas klare divideblaj la arta reprezentaĵo de personoj aŭ scenoj de tio, kion ni povas nomi hieroglifa skribaĵo, kvankam tiuj du elementoj troviĝas ĉiam kune, kompletigante sin reciproke.

La hieroglifa skribaĵo de la majaoj troviĝas en la dua stadio t.e. la karaktero jam ne estas ekzakta

reprezentado de la objekto aŭ ago, kiun oni deziras esprimi, sed nur ĝia simbolo kiu devas esti interpretata. Tiel ekzemple la kapo de la dio de la pluvo signifas la pluvan epokon, kaj por indiki la sezonon de la semado sufiĉis desegni la dion de la maizo. Eĉ pli. Ekzistas certaj signoj, eĉ se ne certaj ankoraŭ, ke tiu ĉi desegna skribaĵo komencis transformiĝi en fonetikan, en sia plej primitiva formo.

Pri kio temas la majaa skribaĵoj ? Ni scias, ke la egiptoj kaj aliaj antikvaj popoloj uzis la skribadon por glori siajn reĝojn kaj por fanfaroni pri siaj militaj sukcesoj, kaj rakonti aliajn gravajn okazintaĵojn. Pri ĉio ĉi silentas la skribaĵoj de la majaoj. Kvankam ĝis nun nur la triono de la majaa skribaĵo estas deĉifrita oni jam povas aserti, ke la plej gravaj objektoj de la surskriboj estas la datoj, kiuj signas la finiĝojn de kalendaraj unuoj, datoj rilate al la religia vivo, al festoj, terkulturaj devoj, astronomioj kaj astrologioj sciigoj. Tiuj surskriboj estas vortŝparaj kaj senpersonaj, konsistantaj ĉefe el numeroj, sciencaj faktoj kaj datoj.

Komplika kalendaro

En la pluraj astronomiaj observejoj, kies ruinoj ankoraŭ estas videblaj, scienculoj de multaj generacioj laboris fervore por malkovri la sekretojn de la universo. Kaj la fortostreĉo ne estis vana. Ili sukcesis elkalkuli ne nur la sunan jaron kun relativa perfekteco, sed ankaŭ la rondirojn de la Luno, de Marso kaj de Venuso. Ili konis la solsticojn kaj ekvinoksojn, kaj sciis antaŭkalkuli la eklipsojn.




La eklezia jaro, kiu devis havi sian ekeston en tre antikvaj tempoj, konsistis el 260 tagoj, dum la civila aŭ astronomia jaro havis 365 tagojn. Sur la monumentoj la majaoj kutime

ĉizis paralele la daton laŭ ambaŭ sistemoj, aldonante al ili iafoje ankaŭ la pozicion de la Luno kaj aliaj astroj, kaj danke al tiuj detaloj ni povas hodiaŭ traduki tiujn datojn al nia kalendaro. La civila jaro estis dividita en 19 monatojn. La unuaj 18 havis po 20 tagojn, dum la lasta, por kompletigi la jaron, havis nur kvin tagojn. Periodo pli longa ol la jaro estis tiu de 20 jaroj, nomita *kātun*, kies 20-obloj ankaŭ estis rigardataj gravaj dividoj de la tempo. Tiel la *baktun* havis 400 jarojn, la *piktun* 8,000, la *kalabtun* 160,000, kaj la *kinĉiltun* 3,200,000, kaj fine la *alaŭtun* 64 milionojn da jaroj ! La nura fakto, ke la majaoj havis apartan vorton por esprimi tiom longegan periodon, preskaŭ egalan al la eterneco—la eŭropaj lingvoj ne konas pli grandan esprimon ol jarmilon — donas la indikon pri la scienca kvalito de la astronomoj de tiu epoko. Sur la monumento Numero 10 de Tikal en Gvatemalo troviĝas kalkulo kiu atingas daton post iom pli ol kvin milionoj da jaroj !

Tamen la klasika ciklo de la majaa vivo estis la etapo de 52 jaroj. Je la fino de tiuj etapoj oni starigis monumentojn egale kiel post ĉiu dudeko da jaroj. La majaoj kredis, ke iam venos la “fino de la mondo” kaj ke tio okazos je la finiĝo de unu el tiuj periodoj, dronigante la mondon en mallumo. Pro tio antaŭ la finiĝo de tia periodo ili estingis ĉiujn fajrojn, eĉ la sanktajn gardatajn de grand-nombraj vestaloj. Ili ne kuraĝis per la lumo de siaj fajroj kontraŭi la volon de la dioj, dronigi ilin en mallumo. La lastan nokton de la periodo ili pasigis silentaj kaj malgajaj atendante la finon ; sed la sekvantan matenon kiam reaperis la suno ĉe la horizonto la majaoj denove

ekbruligis la fajrojn kaj komencis orgian feston kiu daŭris dek tri tagojn, honore al la novaj 52 jaroj, kiujn la dioj donacis al la homaro. Tiuj 13 tagoj estis ekster la kalendaro kiel “supertagoj” necesaj por korekti la kalendaron.

La eltrovo de la nulo

	•	• •	• • •	• • • •
0	1	2	3	4
				
5	6	7	8	9
				
10	11	12	13	14
				
15	16	17	18	19

Maya-numeroj : 0 ĝis 19

Por tiom komplika kronologia kalkulo kompreneble estis necese havi adekvatan aritmetikan sistemon. La majaoj sukcesis havigi ĝin al si per propra fortostreĉo. Ili elpensis sistemon de dudeko, similan al nia decimalo sistemo kun la diferenco, ke ĉiu sekvanta cifero signifis multobligon per 20, sed ne per 10 kiel en la decimala sistemo. Escepto en tiu sistemo estas la tria pozicio kiu ne multobligas per dudek, sed per nur 18. Tiu ĉi escepto, kiu iom malhelpas la perfektecon de la sistemo, estis enkondukita pro tio, ke en iliaj kalendaraj kalkuloj la numero 360 estis multe pli utila ol la numero 400. En tia sistemo de pozicioj estis nepre necese havi ciferon per kiu plenigi malplenan pozicion, t.e. la nulon. Tiel, simile kiel la hindostanoj eltrovis la ciferon hodiaŭ tiom utilan al la mondo—precipe se ĝi troviĝas dekstre

20	37	300	360
7.113	7.202	100.932	169.200

Ekzemploj de maja-numeroj.

de ciferoj—ankaŭ la majaoj eltrovis ĝin, mil jarojn pli frue ol ili.

Krom la nulo la majaa numerado havas nur du ciferojn: la punkto

egalvaloras al unu kaj la streko al kvin. Tiel du punktoj estas du, unu streko kaj tri punktoj estas ok, tri strekoj kaj kvar punktoj estas dek naŭ. Sed dudek jam estas punkto kaj sub ĝi la nulo, en dua pozicio. La nulo de la majaoj havis formon de konko kun kvar streketoj en ĝi.

Jen la ĉefa temo kaj maniero de la majaa skribado laŭ la triono ĝis nun deĉifrita. Dum mia mano avide glitas super kelkajn ankoraŭ misterajn hieroglifojn mi pensas pri tio, ĉu oni iam sukcesos deĉifri la tuton, kaj se jes, ĉu tio alportos al ni novan lumon pri la historio, vivo kaj moroj de la plej civilizita popolo de la antikva ameriko?

daŭrigo (de p. 167)

Pollanda Asocio. Poste aperas la Ĉefdelegito de U.E.A. por Polujo, samideano Sakowicz, kiu speciale venis el la malproksima ermitejo por saluti la memoron de D-ro Zamenhof, kiun li persone konis. S-ano Sakowicz rememorigas la ardajn vortojn de D-ro Zamenhof pri “la interna ideo” de nia movado kaj alvokas kunvenintojn “semi kaj semi konstante”. Fine la ĝenerala sekretario, samideano Dratwer laŭtlegas la leteron de la plej aktiva en Polujo esperanta grupo en Vroclav, kies prezidanto, s-ro Garbar, ne povante veni persone, salutas la memoron de nia neforgesebla Majstro.

La ceremonio finiĝas per komuna kantado de *La Espero* kaj fotografado sur la ŝtuparo de la tombo.

K.S.

Svedlando

La ŝtatsubvenciata kurso “Nuntempa Svedlando,” 27/7–2/8/1952. Povas aliĝi ankoraŭ kelkaj personoj. Kurs-

kotizo 75 sved. kr. (por prelegoj, loĝado, manĝo kaj studekskurso). Informiĝu ĉe Sveda Esperanto-Instituto, Sibyllegatan 83, STOCKHOLM, Svedlando.

Turistaj tagoj en Gotenburgo : 31/7 kaj 1/8/1952. Inter la programoj estas vizito al Marstrand kaj kastelo, ŝipekskurso, kaj amika vespero (vidu ankaŭ p. 162).

La sveda sekcio de Kristana Esperantista Ligo Internacia aranĝis je 24-25 marto sian jarfeston en Örebro: ĉeestis ĉirkaŭ 100 gesamideanoj. Okazis Esperanta diservo en la YMCA-domo kaj la salono estis plenplena.

La membronombro de la sveda sekcio de KELI estas nun ĉ.450, kun 8 lokaj grupoj. La propagandistino S-ino Anna Alamo-Sandgren faris de post 1947 ĉ. 1000 prelegojn al svedaj kristanoj pri Esperanto kaj ĝia utilo por evangelia misio.

Mason Stuttard :

Epikura promeno en Oslo

UNU el la ĝojoj de vojaĝado estas la ebleco ekkoni kaj ĝui manĝojn indiĝenajn, ofte fremdajn. Jam antaŭ multaj jaroj tuj antaŭ mia unua vizito eksterlanden saĝa spertulo donis al mi la prudentan konsilon: Kiam vi estas en Romo, faru kiel la Romanoj. Temis ĝuste pri manĝaĵoj. Li, kiel ankaŭ mi en la postaj jaroj, vidis homojn en la eksterlando, kiuj ne povis forigi de si la antaŭjuĝojn de jardekoj kaj kiuj, elektinte nur la konatajn kaj ŝatatajn pladojn, rezignis kaj maltrafis frandaĵojn vere palatotiklajn.

Kongresanoj en Oslo povos ĝui tute specialan frandadon pro la abundo de nutraĵoj. Kontraŭe je la populara kredo eksterlande, oni ne servas ĉiam fiŝojn en Norvegujo! Tamen fiŝaj pladoj oftas pro la relative malalta kosto kompare kun viando. Instalaĵo por konservado kaj transporto de junaj kaj *vivantaj* moruoj—ekzemple en Trondheim—garantias absolutan freŝecon sur la tabloj de la ĉefurbo. Kiu manĝas “buterpanojn”—kaj kiu povas resti en Skandinavio ne gustumante ilin? —ekkonos la appetitpikan guston de “forkpecoj” da salharingo, eble kun malmole boligita ovo. Precipe britoj devos inhibi sian tradician malinklinon al nekuiritaj viandoj kaj fiŝoj por provi ilin. Krom la diverseco da fiŝspecoj, konataj ankaŭ en aliaj landoj, kun ties flankaj langoj, koroj, frajoj kaj simile, ekzistas alia tute speciala nordlanda plado de fiŝo . . . la fiŝpudingo! La fiŝviandon oni pistas ĝis konsisto de pasto kaj post enmikso de diversaj ingrediencoj por reliefigi la guston oni kuiras je amaso kaj servas po tranĉaĵoj kun saŭco. Tiu

plado cetere estas la plej malmultekosta fiŝplado en Oslo.

Konvena ponto de la fiŝoj al la viandoj certe estas la balenviando kiun oni ofte manĝas en Oslo. Temo de moko kaj/aŭ anatemo en aliaj landoj, la balena viando en Norvegujo ĝuas specialan lokon sur la menuo—ne nur pro la malpli alta kosto, sed ankaŭ pro sia bonega gusto. Mi ne scias, ĉu la norvegoj disponas pri aparta maniero de traktado en la preparo de tiu ĉi viando, sed mi mem bedaŭras la jarojn de rifuzo en Anglujo. Fritite laŭ tranĉaĵoj kun iom da graso, ĝi estas ne nur alternativo en la senvianda tago sed meritplena plado en si mem.

Grandparte agrikultura lando, Norvegujo disponas pri granda kvanto da viandoj diversspecaj kaj la butikoj atestas pri la rikolto. Iom strange estas, ke ŝafviando maloftas. Oni povus supozi, ke la alte situantaj plataĵoj kaj deklivoj kun — por bovinoj—ne tre sukoplana herbo estus paradizo por ŝafaroj. Precipe la malofto estas surpriza, ĉar ŝafripoj kuiritaj kun brasiko estas ŝatata delikataĵo sur la norvega tablo.

Da porkaĵo kaj bovaĵo estas ja abundo! Tamen la kosto estas alta. En restoracioj en Oslo oni devas pagi inter 6 kaj 8 kronojn por plado kun bifstekoj aŭ kotletoj, kaj por simplaj viandbuloj (la famaj “*meat balls*” de la usonanoj) 5 kronoj estas kutima prezo. Juste al la restoracioj mi tamen aldonu, ke la manĝoj estas MANĜOJ! Malsaton oni ne devas timi dum pluraj horoj poste. Mi aŭdis eĉ norvegojn aserti, ke la norvegoj tromanĝas! En la fako de viando oni disponas pri plado kiu

korelativas kun la “fiŝpudingo” ; tio estas la viandpudingo, pistita ĝis pasto kaj servata kiel malmultekosta vianda plado.

Frandaĵo por la norvegoj estas la boacviando. Simile al la viando de aliaj sovaĝaj bestoj, ĝi havas iom fortan guston kiu eble ne konvenos al ĉies palato, kaj oni prefere manĝu kun ĝi vakciniojn kies maldolĉe-dolĉa piko nuancigas kaj modifas la guston alian. En Trondheim mi havis la privilegion viziti la frostinstalaĵon por konservado de viandoj kaj fiŝoj. Tiklis mian humorsenton tie vidi amason da skatoloj prete pakitaj kun la celloko klare indikita: LONDONO ! La angloj, grumblante je sia dimanĉa tagmanĝo certe kredos, ke ili manĝas maljunan virbovon, aŭ eĉ ĉevalon ! Tamen kun konvenaj preparo kaj servado ĝi estas delikataĵo.

La norvega matenmanĝo estas neordinara travivaĵo por ne-skandinavianoj. Mi citu propran sperton. La fokuspunkto de la manĝosalono estas tablego pretigita kiel bufedo. La gastoj kutime ricevas boligitan ovon, buteron, kafon, kremon, sukeron kaj eventuale glason da lakto pere de la servist(in)o. Poste ili servas sin mem de la tablego. En unu hotelo kie mi tranoktis, mi kalkulis sur la matenmanĝa tablo 22 diversajn pladojn ! Kia diverso ! Kia elekto ! Kia kolororiĉo ! Rostita porkviando, boligita ŝinko, kolbasaj tranĉaĵoj (*salami* k.s.), konservitaj viandoj, salikoketoj, salharingoj, sardeloj, kaviaro, “itala salado”, “rusa salado” (bongustegaj majonezaĵoj), fromaĝoj de Rocquefort kaj Gouda, kaj la bruna kaprinalakta fromaĝo indiĝena, kiun ĉiuj nepre gustumu ! Aldoni al tio la gastojn tentas panoj diversspecaj—la plengrena, “superbakita”, malhelbruna,

blanka kaj biskvitoj diversaj. Parenteze en la fenestroj de la bakmajstroj oni povas rigardi dekduon da diversspecaj panoj, de la dolĉa “kuk”-pano ĝis la preskaŭ nigra “*pumpernickel*”.

Ankaŭ en la “konditora”* arto la norvegoj brilas per sia talento, kaj la freŝa “viena pano” kun kafo kaj kremo (neniu sinrespektanta norvego trinkas volonte kafon kun nur lakto !) estas franda travivaĵo kiun neniu kongresano maltrafu. Pro la abundo de freŝa kremo frandemuloj povas fari al si veran regalon en la multaj kafejoj en la mezo de la urbo. Teon oni volonte kaj ofte trinkas prefere sen lakto sed kun sukero, simile al nederlanda kaj germana maniero. Kiuj trinkas teon prefere trinku ĝin tia kia ĝi estas, kaj por angloj estas konsilinde ne aldoni lakton aŭ kremon. La rezulto estos pala imitaĵo de la pli densa kaj pli forte gusta angla trinkaĵo al kiu ili kutimiĝis. Lakton oni multe kaj ofte trinkas kaj la kvalito estas bonega. Eĉ kiam oni havas kafon aŭ teon oni ofte mendas ankaŭ glason da lakto.

Da bieroj ekzistas diversaj, sed la kvalito ne estas tia, ke oni devas aparte prezenti ilin. Certe ili ne havas la kvaliton de, ekzemple, bavara biero, kaj la “Pilsener” estas enlande farita do ne aŭtentika. La kvalito tamen estas tiel alta, kiel en multaj landoj kaj kondiĉe, ke oni povu ricevi ĝin glacimalvarma, ĝi estas ĝuebla. Nur en unuarangaj hoteloj kaj restoracioj oni disponas pri bieroj specialaj. Menciinda—ne nur por la abstinenculoj—estas la nealkohola “Vørterøl”, preparaĵo de

* Sajnas al mi ke ni bezonas specialan vorton por tiuj tute specialaj frandbakaĵoj : “konditor” jam estas iom internacia.

daŭrigo sur p. 188

Oliver Goldsmith (1728–1778) :

Tradukaĵo

Naciaj antaŭjuĝoj

CAR mi estas unu el tiu vagemaj gentoj de mortemuloj, kiuj pasigas plejparton de sia tempo en drinkejoj, kafejoj kaj aliaj publikaj rendezuoj, al mi eblis observi senlime diversajn karakterojn, kio por meditema persono estas multe pli alta distraĵo, ol vidi ĉiujn artajn aŭ naturajn strangaĵojn. Dum unu el miaj lastatempaj vagadoj mi hazarde troviĝis inter seso da sinjoroj, varme disputantaj pri iu politika afero, pri kies solvo, ĉar ili estis egale dividitaj laŭ opinio, ili juĝis konvene apelacii al mi, kio kompreneble logis min partopreni la konversacion.

Inter multaj aliaj temoj, ni profitis la okazon pritrakti la ecarojn de pluraj eŭropaj nacioj ; kiam unu el la sinjoroj, flankenŝovante sian ĉapelon, kaj alprenante pompan mienon, kvazaŭ li posedis en si mem ĉiun meriton de la angla nacio, deklaris ke la nederlandanoj estas amaso da avaraj mizeruloj ; la francoj aro da ruzaj flatuloj ; la germanoj, ebriuloj kaj bestaj manĝeguloj ; kaj la hispanoj fieraj, arogaj, malafablaj tiranoj ; sed ke la angloj, laŭ kuraĝo, donacemo, pardonemo, kaj ĉiu alia virto, superas la tutan mondon.

Tiun ĉi tre kleran kaj saĝan rimarkon ricevis kun ĝenerala rideto aproba ĉiuj ĉeestantoj—ĉiuj, tio estas, kun escepto de via humila servanto, kiu, penante kiel eble plej bone konservi sian seriozecon, kaj apogante sian kapon surbrake, restis kelkan tempon en pozo de afektita meditemo, kvazaŭ mi estas pripensanta ion alian, kaj ŝajne ne priatentas la diskutatan temon. Mi esperis tiurimede eviti la neceson por komentario, kiu senigus la sinjoron je lia imaga feliĉeco.

Sed mia pseŭdo-patrioto neniel inklinis tiel facile min forpermesi. Ne kontenta ke lia opinio aŭdiĝu sen kontraŭdiro, li insiste decidis, ke ĝin aprobu la voĉo de ĉiu ĉeestanto ; por kiu celo, sin turnante al mi kun mieno de nepriskribebla memfido, li demandis, ĉu mi ne opinias same Mi tial diris al li, ke miaparte, mi ne estas permesinta al mi paroli per tia aŭtoritata tono se mi ne estus travojaĝinta Eŭropon, kaj esplorinta la morojn de tiuj diversaj nacioj tre pene kaj precize ; ke eble pli senpartia juĝanto ne timus aserti ke la nederlandanoj estas pli ŝparemaj kaj laboremaj, la francoj pli sobraj kaj ĝentilaj, la germanoj pli fortikaj kaj paciencaj pri laboro kaj laciĝo, kaj la hispanoj pli seriozaj kaj trankvilanimaj, ol la angloj ; kiuj, kvankam sendube bravaj kaj malavaraj, estas samtempe nesingardaj, obstinaj kaj impulsaj ; tro ĝojemaj pri prospero, kaj tro facile premataj de malsukceso.

Evidente estis al mi, ke ĉiuj rigardis min per ĵaluzaj okuloj antaŭ ol mia respondo finiĝis, kaj tuj poste la patriota sinjoro rimarkis, kun malestima rikano, ke lin tre mirigis la konsciencoj de iuj homoj, kiuj povas vivi en lando kiun ili ne amas, kaj ĝui la protekton de registaro kontraŭ kiu en iliaj koroj ili sentas sin radikaj malamikoj. Konstatante ke per tiu modera proklamo de mia vidpunkto mi estas perdinta la estimon de miaj kunuloj, kaj dubiginta ilin pri miaj politikaj principoj, kaj bone komprenante ke argumenti kontraŭ tiaj obstinuloj estas senutile, mi ekpagis mian kalkulon kaj foriris al mia

loĝejo, pripensante la absurdan kaj ridindan naturon de naciaj antaŭjuĝoj kaj obsedo.

El ĉiuj famaj sentencoj de antikvaj epokoj, neniu portas pli grandan honoron al sia aŭtoro, aŭ pli profundan plezuron al la leganto (almenaŭ se li estas posedanto de grandanima kaj bonvola koro), ol tiu de la filozofo kiu, demandite pri lia nacieco, respondis ke li estas “civitano de la mondo”. Kiom malmultaj estas tiuj en moderna tempo, kiuj povus respondi same, aŭ kies konduto konformas al tia konfeso ! Ni estas tiom indiĝenoj de unu speciala loko, aŭ anoj de unu bagatela societo, ke ni ne sentas nin plu la ĝeneralaj loĝantoj de la terglobo, aŭ membroj de tiu vasta sociego kiu enkalkulas la tutan homaron.

Se tiuj antaŭjuĝoj troviĝus inter nur la plej humilaj kaj sensignifaj homoj, eble oni povus trovi senkulpigon, ĉar tiaj homoj havas malmultajn—eĉ foje neniajn—okazojn alĝustigi ilin per legado, vojaĝado, aŭ interparolo kun fremduloj. Sed domaĝe estas, ke ili infektas la mensojn, kaj influas la konduton, eĉ de niaj sinjoroj ; de tiuj, mi volas diri, kiuj havas ĉiun rajton al tiu titolo kun escepto de manko de antaŭjuĝo, kiu tamen miaopinie devas esti konsiderata kiel la karakteriza signo de sinjoro ; ĉar kiom ajn nobela estu la deveno de homo, kiom ajn alta lia rango, aŭ kiom ajn abunda lia posedaĵo, se li malgraŭe alkroĉas sin al naciaj kaj aliaj antaŭjuĝoj, mi malkaŝe diras al li, ke li havas maldelikatan kaj vulgaran menson kaj ne povas juste pretendi al sinjoreco. Kaj efektive, vi ĉiam trovos ke tiuj plej inklinas fanfaroni pri nacia merito, kiuj posedas malmultan, aŭ eĉ nenian, propran meriton ; ol kio, kompreneble, nenio estas pli natura. La maldika ampelopso tordas sin ĉirkaŭ la fortika kverko sole pro tio, ke ĝi ne estas sufiĉe forta por subteni sin mem.

Trad. Avoto

Noto : Oliver Goldsmith naskiĝis en Irlando, filo de pastro, eniris Kolegion Trinity, Dublino, en 1744 kaj poste studis medicinon en Edinburgo. De 1754 ĝis 1756 li vagadis tra Eŭropo kaj liajn tiamajn travivaĵojn aludas lia poemo *The Traveller* (La vojaĝanto). En 1756 li komencis loĝi en Londono kaj verkadis komisie por librovendisto, sed fine eniris la terenon de klasika literaturo. Liaj dramoj, poemoj, eseoj kaj beletraĵo akiris por li senmortan famon ĉie, kie oni parolas la anglan lingvon.

daŭrigo (de p. 186)

la malto antaŭ fermentiĝo. Iuj palatoj certe trovos ĝin bona, kaj pri la nutra valoro ne povas esti dubo. La farado de vinoj kaj likvoroj estas ŝtata monopolo en Norvegujo kaj la industrio liveras kontentigajn kontribuojn al la fisko . . . je korelativa malpeziĝo de la monujo ! Sekve la prezoj de ĉiuj vinoj kaj brandoj estas altaj kaj en Oslo ebriiĝo estas lukso ne por la amaso, kvankam en la semajnfinoj oni povas rimarki multe da ebriaj homoj sur la stratoj.

Rilate al la komunaj manĝoj en la kadro de la kongreso, menciindas, ke ili ne estas “malmultekostaj” laŭ la senco de tiu vorto en antaŭaj kongresoj. Ili tamen donas bonajn manĝojn egalajn al tiuj en ordinara restoracioj je iom malpli alta kosto. La manĝoj estas sufiĉaj kaj satigaj kaj plene rekomendindaj. La entrepreno, kiu prizorgas tion, estas konstanta en la ĉefurbo kaj tie ĝuas altan reputacion pro siaj menuoj kaj prezoj.



Oslo Vokas Vin!

Adreso : Boks 942, Oslo, Norvegujo.

Bankokonto : Nen Norske Creditbank No. 6099 B/179.

Poŝtgirokonta : 153. 85.

Honora Komitato : Aldone al la nomoj en nia lasta komuniko, ni havas grandan plezuron anonci ankaŭ la nomojn de G. Natvig Pedersen, Prezidanto de la norvega parlamento kaj Frieda Dalen, prezidantino de la Instruistina Asocio de Norvegujo.

Kongresa Balo : La magistrato de Oslo bonvolis disponigi al la 37-a U.K. la Urbdomon ankaŭ por la Kongresa Balo. Tiu festo okazos vendredon vespere la 8-an de aŭg.

Loĝejoj : Ni admonas al kongresanoj urĝe mendi sian loĝejon. Ni devos baldaŭ doni firman mendon al la hotelestroj kaj aliaj kaj indiki nian rezignon pri litoj kiujn ni verŝajne ne uzos. Se oni prokrastos oni riskas ne havi kontentigan loĝejon.

Ekskursoj : Pro rearanĝo de kelkaj detaloj la prezoj estas iomete modifitaj ĉe iuj ekskursoj. (*Tb*) Oslo-fjordo (pro pli bona manĝaranĝo) estas 24.00 n.kr. anst. 22.00 ; (*Tc*) Sundvollen estas 16.00 n.kr. anst. 20.00 ; (*M*) Popolkultura Muzeo nun inkludas ankaŭ viziton al Vikingŝipoj, polusesplora ŝipo "Fram" kaj la flosan Kon-Tiki je 6.50 n.kr. anst. 5.00 kr. Grave : la ekskurso (*Tb*) estas limigita je maksimume 350 personoj. Kiuj mendos post atingo

de tiu nombro ricevos biletojn por (*Tc*) se oni ne alie indikos.


Lofthus postkongresa aranĝo : Tiu aranĝo estas limigita je maksimume 70 personoj. Ne estas amasrestejo, sed loĝado en privataj domoj. Iuj eksterlandanoj konstatis, ke ili povas mendi la trajnbiletojn en sia lando kaj tiel ŝpari valuton. Ni aprobas tiun metodon kaj volonte akceptos nur la koston de restado en Lofthus, 150.0 n.kr.

Kongresa Libro : Tiu libro nun estas en la presejo kaj ni esperas havi ĝin en la unua semajno de junio, kiam ni dissendos ĝin al ĉiuj aliĝintoj. Ĝi enhavos la plenan programon kaj multajn informojn utilajn por la kongresanoj. Zorge studu ĝin !

Statistiko (ĝis 30 apr.) : Argentino 1, Aŭstralio 2, Aŭstrujo 8, Belgujo 20, Brazilo 1, Britujo 199, Danujo 59, Ebura Bordo 2, Finnuno 60, Francujo 113, Germanujo 80, Hispanujo 2, Indonezio 1, Irlando 1, Italujo 54, Izraelo 2, Japanujo 1, Jugoslavujo 6, Kanado 1, Kenjo 2, Nederlando 56, Norvegujo 233, Polujo 2, Portugalujo 1, Sudafriko 2, Svedujo 234, Svislando 14, Turkujo 1, Urugvajo 1, Usono 5. Sume 1164 el 30 landoj.

pro L.K.K.,

Mason Stuttard, K.K.S.



Radio kaj Esperanto

Ĉiujn informojn pri radio sendu al S-ro G. Larglantier, 29 Bd. Murat, PARIS 16, Francujo.

En la tabelo horoj de la dissendoj estas laŭ la horsistemo de Greenwich. Por Mez-Eŭropa tempo oni aldonu unu horon.

Por somera tempo oni aldonu laŭ neceso — kutime 1 horon.

Mallongigoj : I=Informoj, P=Parolado, K=Kurso, M=Muziko

Dimanĉo	18.00–18.15	Sofia. 39.11m. I. Radio Sofia, Bulgarujo.
	18.00–18.30	Rabat. 482m. K (francilingve). Radio-Maroc, Rabat, Maroko.
	22.15–22.40	Hilversum, 298m. kaj 188m. I.M. (ĉiun duan lundon) : V.A.R.A. Heuvellaan 33, Hilversum, Nederlando.
Mardo	00.45–01.00	Bauru. 91m., 240m. K. I. Radio Bauru, Brazilo.
	07.45–08.00	Lille. 235m. K. I. Esperanto, 94 rue de la Rochelle, Tourcoing, (Nord), Francujo.
	11.55–12.00	Bern. 48.66m., 31.46m., 16.87m. P. D-ro Baur. SRG, Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern.
	15.00–15.15	Wien. 203m., 25m., 30m., 41m., 48m. P. (ĉiun duan mardon).
	17.35–17.40	Bern. 48.66m., 31.46m., 19.60m. P. D-ro Baur.
Merkredo	22.15–22.30	Gvatemalo. 49m. I. La Voz de Centro América, Guatemala C.d., C. Ameriko.
	15.45–16.00	Graz. 417.2m. K. (ĉiun duan merkredon) Radio Graz, Aŭstrujo.
	18.00–18.20	Roma. 25.21m., 31.35m., 49.92m. P. Radio Roma—Esperanto, Via Vittorio Veneto 56.
	19.30–20.00	Madrid. 233m., 42.33m. P. Radio S.E.U., Sección Esperanto, Diego de León 49, Madrid, Hispanujo.
	21.35–21.40	Wien. 513m., 25.46m., 48.74m. I. Radio Wien, Argentinierstr. 30a, Wien IV. Aŭstrujo.
Ĵaŭdo	08.30–08.45	Paris. 348m. K.
	11.55–12.00	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
	17.35–17.40	Bern. Kiel marde. P. D-ro Privat.
Vendredo	18.00–18.20	Roma. Kiel merkrede.
	22.15–22.30	Hilversum. 402m. P. (nur la unuan aŭ duan vendredon de ĉiu monato). N.C.R.V. Schuttersweg 8, Hilversum, Nederlando.
	22.30–23.00	Hilversum. Kiel lunde, sed ĉiusemajne. M.
Sabato	08.30–09.00	Rio de Janeiro. 375m., 30.71m. K. I. Radio Ministério da Educação, Rio de Janeiro, (DF) Brazilo.
	20.00–20.15	Sofia. 39.11m. I.
	22.15–22.20	Hilversum. 402m. P. K.R.O., Emmastraat 52, Hilversum, Nederlando.

Programo Roma : (notu la ŝanĝitan horon) 6.VI. **Grava fonetika eksperimento** (vidu plenajn detalojn sur paĝo 167) ; 11.VI. La itala komponisto, Antonio Stradivari ; 13.VI. La civila misio de la kristana Romo ; 18.VI. Rekonstruado de Kalabrio ; 20.VI. Itala literaturo 'Chanson de Roland' ; 25.VI. por geknaboj, *Pinokjo* ; 27.VI. Sankta Paŭlo ; 2.VII. de Genova al Ventimille ; 4.VII. Respondoj al geaŭskultantoj. (La parolantoj estas Profesoroj Blasimme, Musella kaj Minnaja.)

Svisa Radio : la prelegoj de D-ro Baur okazas nun regule laŭ la jena monata skemo, je 11.55 kaj 17.35 :

- 1-an mardon : komentario pri internacia politiko
- 2-an mardon : svisa politiko aŭ sviso evento.
- 3-an mardon : svisa turisma aŭ kultura temo.
- 4-an mardon : novaĵoj el Esperantujo kaj leterkesto
- 5-an mardon : ne antaŭfiksita temo.

Krome, ĉiun ĵaŭdon, okazas prelego de Prof. E. Privat.

Aŭskultantoj nepre sendu raportojn pri la elsendoj de ĉi tiu stacio kaj petu la ĵus aperintan, novan, bele ilustritan programon por la somera sezono : adreso, S.R.G., Kurzwellendienst, Neuengasse 23, Bern, Svislando.

UNIVERSALA ESPERANTO-ASOCIO

Centra Oficejo : Heronsgate, Rickmansworth, Herts., Anglujo

OFICIALA INFORMILO

N-ro 239.

5-an de Majo 1952.

STATISTIKO. Jen la stato de la membraro je la fino de Aprilo, kaj ankaŭ, por komparo, je la sama dato en 1951 :

	1951	1952
Asociaj membroj	3839	3394
Individuaj membroj		
MJ	687	698
MA	4063	3344
MS	268	439
Patronoj ..	16	8
DM	212	256
HM	58	57
	5304	4802
	9143	8196

DELEGITOJ

Aŭstralio

Kalamuda (Western Australia). D : R. Thomson, 49 Railway Road. Tel : 37.
Newcastle (New South Wales). D : R. Perry, 51 William St., Tighes Hill.

Brazilo

Baurú. FD (Instruado) : A. J. Fraga Padilha, Caixa Postal 353.
Fortaleza. D : P. A. Cardoso, Rue Princesa Isabel 487—Caixa Postal 341. Tel : 2818.
Pedregulho (São Paulo). D : H. Leite Pinto, Rua André Vilela 28.
Porto Alegre (R.G. do Sul). FD (Lingvoj) : W. F. Gonçalves, Rua João Pessoa 1210-I.
São Paulo. FD (Lingvoj) : Vakas.

Britujo

Bristol. D : A. E. Boyce, 13 Southfield Road, Cotham, Bristol 6. Tel : 46822.
 VD : F-ino E. L. Parson, 17 Cornwallis Crescent, Clifton, Bristol 8. Tel : 38135.
Denton (Lancashire). D : F-ino C. Mills, 41 Haughton Green Road.
Leeds. FD (Doganaj kaj Akcizaj Aferoj) : R. Abram, 19 Chelwood Drive, Leeds 8.
London. FD (Doganaj kaj Akcizaj Aferoj) : Vakas.
 FD (Meteorologiaj Instrumentoj) : Vakas.
Mexborough (Yorkshire). FD (Socikredito) : Vakas.
Poole (Dorset). D : S-ino I. G. Myers, 36 Parkstone Road. Tel : 84.

Uttoxeter. D : Vakas.

Westgate-on-Sea. D : Vakas.

Danujo

Hallund. FD (Farmacio) : Vakas.

Viborg. FD (Farmacio) : P. Møller, Kildevej 7.

Finnlando

Helsinki. FD (Blinduloj) : O. Lehtivaara, Aleksiskivenkatu 22. Tel : 75422.

Tampere. VD : T. K. Leppä, Pirkkala Killo, Silvontie 9, Härmälä.

FD (Korespondado) : S-ino H. Rannisto, Puuvillatehtaankatu 11 D.

Francujo

Antraigues sur Volane (Ardèche). D : F-ino S. Minault.

Lyon. D : H. Roy, 32 cours Gambetta. Tel : Parmentier 22-04.

Hispanujo

Palma de Mallorca. D : N. Terrasa Pou, Delegacion de Hacienda.

Irlando

Béal Átha an Fheadha. D : Vakas.

Islando

Hafnarfjörður. D : O. Th. Kristjánsson, Tjarnarbraut 11. Tel : 9285.
 FD (Instruado) : la D.

Maroko

Mazagan. D : H. Rousseau, Travaux Publics.

Nederlando

Arnhem. FD (Muziko) : F-ino B. Leopold, Sweerts de Landasstraat 97.

Venlo. D : Vakas.

Portugalujo

Ĉefdelegito : J. Antunes, Rua dos Fanqueiros 106-IV-dto, Lisboa. Tel : 30434.

Agueda. D : Vakas.

Svedujo

Stora Levene (Västergötland). D : C.-E. Carlsson, Adelsåsen. Tel : 27114 Vara.

Svislando

Baden. FD (Fiziko) : Vakas.

Zürich. FD (Fiziko) : A. Koller, Buchlernstr. 4, Zürich 48.

FD (Ŝako) : Vakas.

Usono

Washington (D.C.). D : Vakas.

per



flugu al

OSLO

Malpli ol 5 horojn da flugado apartigas Londonon de Oslo per BEA. Aviadiloj funkcias ĉiutage ambaŭdirekten ; ravaj lunĉoj servataj survoje. Vi povas flugi per BEA ankaŭ al ne malpli ol 31 aliaj lokoj en Eŭropo kaj Norda Afriko. Rilate al Britoj : la veturprezo ne estas elprenota el viaj permesitaj turismaj elspezoj—vi povas rezervi la £25 por uzo post via alveno ! Por ĉiuj informoj kaj rezervoj (ne estas krompago por tio) vin turnu al ĉefaj vojaĝagentoj, al lokaj oficejoj de BEA, aŭ al BEA, Dorland Hall, 14-20 Regent Street, London, S.W.1 (Telefono : Gerrard 9833).



B R I T I S H E U R O P E A N A I R W A Y S

